

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

esperanto

108-a jaro • n-ro 1296 (11) » Novembro 2015



Ni portu nian mesaĝon al la Celaro 2030

La Celaro por Daŭripova Evoluigo 2030 orientas la agadon de UN al daŭripova evoluigo dum la venontaj 15 jaroj. Kiujn mesaĝojn - kaj kontribuon - ni portu al la mondo pri tiu ĉi strebado? En *Esperanto* la temo estos regule traktata, ĉar certe ni havas multon por diri.

228

Eseoj memore al Ivo Lapenna



**Fascina mozaiko de personaj rememoroj
pri la arkitekto kaj konstruinto
de la moderna UEA**

Kopenhago, 2001. 417p. 25cm. Kun kompaktdisko.
€45,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

NEDERLANDA MAJSTRO

Tiu ĉi rakontaro
donas bonan
bildon pri la verkarto
de Louis Couperus
(1863-1923), unu el
la ĉefaj nederlandaj
aŭtoroj. Li kreis
mirinde multflankan
verkaron. Elstaras
en ĝi serio da
psikologie-realismaj
romanoj pri tiutempe
modernaj temoj.
Aliaj verkoj havas
kiel fonon la Romian
Imperion, precipe en ĝia degenera periodo. Tria tipo
estas mitologiaj romanoj, ĝenro, kiun li inventis.



PRI VAGABONDOJ KAJ FRIPONOJ, PRI DAMOJ KAJ KAVALIROJ.
Rakontoj. Louis Couperus. El la nederlanda trad. Gerrit Berveling.
Rotterdam: UEA, 2008. 184p. 21cm.
€6,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

EL LA JUBILEA KOLEKTO



ESPERANTA ANTOLOGIO POEMOJ 1887-1981

Red. William Auld. Pli ol 850
origine verkitaj poemoj de 163
poetoj donas superrigardon pri la
tuta poezia kulturo de Esperanto.
Ilus. Bindita. Kromkovrilo.
12+888p. 22cm. Rotterdam:
UEA, 1984 (2a eld.).

€ 9,00



FUNDAMENTA KRESTO- MATIO DE LA LINGVO ESPERANTO

L.L. Zamenhof. Notoj, antaŭpa-
rolo de G. Waringhien. La origi-
nalan Zamenhofan tekston kom-
pletigas notoj pri la nuntempa
lingvouzo. Bindita. Kromkovrilo.
18+446p. 21cm. 1992 (18a eld.).


€ 9,00



NOVA ESPERANTA KRESTOMATIO

Red. William Auld. Vasta panora-
mo de tekstoj el la tuta E-historio,
inkluzive de rakontoj, elstaraj
tradukoj, sciencaj kaj prilingvaj
eseoj, poemoj pri E-o kaj poezia
antologio el 73 lingvoj. Bindita.
Kromkovrilo. 510p. 21cm. 1991.

€ 9,00



LINGVO KAJ VIVO

Esperantologiaj eseoj de Gaston
Waringhien. Eleganta studaro
pri la fontoj kaj strukturo de
Esperanto: unu el la ĉefverkoj
de la esperantologio. Bindita.
Kromkovrilo. 452p. 21cm.
Rotterdam: 1989 (2a reviziita
eld. kun Apendico).

€ 9,00

Nia rolo en la mondo

■ **Fabrizio Valle**

Jam tempo esta' por ĝenerala pripensado pri nia rolo en la mondo, alivorte, kiel ni, esperantistoj, povas pozitive kontribui por la plibonigo de la mondo.

Certe ne malmulte da esperantistoj asertos, ke ne estas ilia celo plibonigi la mondon kaj Esperanto estas strikte ligita al la plibonigo de la situacio sur la kampo de la lingvaj rajtoj kaj de la demokratia komunikado. "Ne pli ol por tio la esperantistoj devas labori", ili diros.

Kontribuas por tiu pensamano la granda influo de la ideoj de la Manifesto de Prago, vere grava idearo, sed tamen ni ne povas preni ĝin kiel absolutan kompason por nia agado. Labori por la idealoj de tiu manifesto kaj elpensi kelkajn el niaj agadoj surbaze de ĝi estas tute natura sinteno, sed Esperanto estas multe pli ol rimedo por demokratiigi la komunikadon kaj defendi la lingvaj rajtojn de la popoloj. Konkreta aliro al la tiel nomata "interna ideo" de Esperanto, lastatempe iom neglektata kaj eĉ vipata de arida nurlingvismo kaj speco de kontraŭidealisma E-fronto, povas esti la ĉefmotoro de reago al la ŝrumpado de niaj movadaj asocioj, kiuj iel senorientiĝis pro tio, ke la teknologio de informado kaj komunikado malĝisdatigis ilian tradician rolon.

Pro tiu senorientiĝo la esperantistaro preskaŭ unuanime kredas, ke la tempo de la E-asocioj pasis kaj nun la definitiva modo estas agadi nur per Facebook kaj similaj sociaj retoj, sen aliro al la aĵoj socia vivo. La reta vivo fariĝis la granda kaj nura okupo de granda nombro da esperantistoj. Kelkaj eĉ predikas, ke por ĉiam formortis la tradiciaj asocioj kaj nun la E-vivo fluas nur en la retaj sferoj. Fakte estas, ke la kombino de la malfacila adaptiĝemo de la tradiciaj asocioj al la moderna teknologio kun la nekomprenejo, ke la reto estas rimedo por atingi celon kaj ne la celo mem, plus la ĵetado flanken de la interna ideo de Esperanto kaj

ankoraŭ ne tute matura faka agado, kiu igis nin neglekti la plej konkretajn eblojn de aplikado de nia lingvo sur ĉiuj sferoj de la homa vivo, konsistigas la kaŭzon de la krizo de la E-centroj kaj de la ŝrumpo de ilia membraro.

Se ni aldonos al tio la krizon, kiun nia mondo travivas, ni havas situacion en kiu la esperantistoj rolas kvazaŭ homoj ekster sia tempo. Jes ja, ĉar dum la mondo brulas, ni tro kontentiĝas pri ni mem, en nia liliputa Esperantujo kaj tro multe diskutas pri nur la lingvaj problemoj de la mondo, sen elmontri de la ebloj konkrete roli en la mondo per neŭtrala internacia lingvo.

Esperanto estas lingvo, kiu ja celas alporti definitivon solvon por la lingvaj problemoj, sed kun kiu celo? Ĉu ĝi taŭgas nur por babilado en rondo familia? Certe ĝi ankaŭ povas alporti pluson al la socialaj movadoj, al la aktivularo por la defendo de la homaj rajtoj ĝenerale, al la kreado de novaj postenoj kaj enspezfontoj per la disvolvado de la esperantista ekonomio. Ĝi povas esti ilo por monda reto de solidara ekonomio kaj justa komerco. De edukado de infanoj el ĉiuj landoj por amikeco trans limoj. Esperanto povas esti la lingvo de la sociala turismo! Plej konservative, niaj E-centroj povos fariĝi lingvo-lernejoj, en la linio "aplikado de la propedeŭtika valoro de Esperanto".

Nur tiu turnopunkto al pli socie engaĝita movado povos ĝisdatigi nian movadon koncerne la mondon kaj savi niajn asociojn de definitiva malapero!

La ĵus okazinta 100-a Universala Kongreso de Esperanto alportis, kiel dirite de Mark Fettes en unu el liaj paroladoj en Lillo, novaj esperoj kaj aspiroj. Ni do ne maltrafu la okazon por pli funde pensi, pri kiuj esperoj kaj aspiroj temas. Ĉu nur esperoj kaj aspiroj sur la tradiciaj kampoj de agado, ligitaj al la hegemonia E-ideologio por lingvaj rajtoj kaj demokratia komunikado, kvazaŭ Esperanto estus lingvo kun strikta celo?

Vere, mi ne kredas, ke la tradiciaj asocioj povos rehavigi al si la perditan elanon per nur agado por lingvaj rajtoj kaj demokratia komunikado. La fonto de nova elano por nia movado estas la ekflorado de diversaj fakaj movadoj. Ĉiu E-centro, de la lokaj al la internaciaj, elektu sian niĉon: iu fako de la sociala E-entreprenismo, edukado, kulturo, novbabelismo (E-propedeŭtikismo), scienco ktp. Fakaj asocioj ne plu agadu marĝene, sed estu la kernaj asocioj de la E-movado, el du specoj: ĉefmotoraj kaj alligitaj asocioj.

La mondo havas multe da konkretaj problemoj por solvi kaj la vojo al la sukceso por ni, esperantistoj, estas respondi per tre klara kaj konkreta agado la demandon "kiu estas nia rolo en la mondo?".

Ni ne plu povas pensi kaj agi kiel homoj nenion sciantaj pri la krudaj problemoj de nia mondo, sur ĉiuj kampoj. Jam venas la horo rezigni esti movado por Esperanto; ni fariĝu movado per Esperanto! Ni ne plu laboru nur por ke la mondo ekkonu kaj lernu Esperanton, por fariĝi pli justa laŭ la lingva vidpunkto. Venas la horo laboregi per Esperanto por transformi la mondon! Jes, tro ambicia celo, tamen, ĝi estas la vojo kiu povas konduki Esperanton al la centro de la scenejo en nia bolanta mondo kaj doni novajn misiojn al niaj E-centroj. Prediki pri lingvaj rajtoj kaj justa kaj demokratia komunikado eĥigos pli forte kaj vaste, kiam ni estos rekte engaĝitaj en la solvado de la plej krudaj socialaj problemoj de nia suferanta mondo.



Fabrizio Valle estas la redaktoro de la revuo *Esperanto*

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establita kiel organo de UEA en
1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon, la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoro: Fabrício Valle
Grafikisto: Cleber Lemes Brito

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto - p/a Fabrício Valle.
Caixa Postal 476 - AC Central
74.001-970 - Goiânia - GO - Brazilo / Brasil.
redakcio@revuoesperanto.org
<http://bitly.com/bundles/uearevuo/6>

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Limdato por kontribuajoj: la 7-an de la antaŭa monato.
Legata en 120 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (EUR 41);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Anonctarifo (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.

Pagmaniero:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankkonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A
(Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, Nederlando)
PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Tel: +31-10-436-1044 | Fakso: +31-10-436-1751
uea@co.uea.org | www.uea.org

Ĉi-numere

Ĉio fluas, laŭ fama eldiro de la antaŭsokrata filozofo Heraklito. Kial ne ankaŭ la E-movado? Ĉi tiu numero prezentas kiel kernon tri tekstojn tre pripensindajn: la rubrikaj Malferme kun Fabrício Valle kaj Dek Demandoj kun Paulo Lima kaj la enkonduka artikolo de Mark Fettes pri la temo "Celaro 2030", kiun ni ofte traktos en nia revuo. Se oni komparas ĉi tiujn tri tekstojn, efektive eblos trovi malsamajn ideojn kaj deirpunktojn, sed certe ĉiuj havas kernan identecon, ĉar ĉiuj laŭ sia maniero traktas la saman temon: ŝanĝon – la fluon de la manieroj vidi kaj kompreni la E-movadon.

Fabrício Valle | https://plus.google.com/u/0/+RevuoEsperantoRedakcio_UEA

Enhavo



222

Dek Demandoj

Paulo Lima alportas tute novajn kaj laŭ la tradicia movada sinteno iom provokajn ideojn pri la E-movado



232

Junigi la komunumon: temo por AMO, defio por ĉiuj

– Stefan MacGill



236

Projekto AMU Poznanon... Relanĉita

Ĵenja Amis

Malferme | 219

Nia rolo en la mondo – Fabrício Valle

Unua Alineo | 221

TEJO-sukcesoj en Eksteraj Rilatoj –
Francesco Maurelli
La jaro Montevideo daŭras –
El la redakcio

Eventoj en Perspektivo | 224

Kelkaj eventoj sub la lupeo

UEA-ano de la unua horo | 225

Hans Bernd Ashauer-Jerzimek

Kalejdoskopio | 226

Notoj pri interesaj eventoj, homoj kaj agadoj

UN | Celaro 2030 | 228

Esperantista perspektivo pri la streboj al daŭripova mondo

Premio Deguč 2015 al Ēva Farkas-Tatár | 231

UEA invitas prelegi en la IKU-sesio en Nitro

Oficiala Informilo

La dolĉa vivo itala | 234

Yves Nivelsteen

Kial tiom gravas eksteraj rilatoj por ni | 235

Michael Boris Mandirola

Helpe de Biblioteka Apogo
Bachrich al ok bibliotekoj

Rezultoj de la 2-a Muzika Konkurso de la revuo Kontakto | 237

Forpaso | 238

Laste Aperis | 239

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Mark Fettes, 2658 E 21st Av, Vancouver BC, Kanado.
V5M 2W1: +1-778-928-4489
mtfettes@sfu.ca

Vicprezidanto: S-ro Stefan MacGill, Pannónia u. 30.1.6, HU-1136 Budapest, Hungario.
+36 (1) 349 5207
stefan.macgill@gmail.com

Ĝenerala Sekretario: S-ro Martin Schäffer.
+52 596 924 5144 +49 30 69 20 48 461
esperantst@gmail.com

Membro: S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Międzynarodowa 38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa, Pollando.
+48 22 252 79 21 [h], +48 6000 51 425
bpietrzak@onet.eu

Membro: S-ro José Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio.
+56 65 2256660 [h]
+56 65 2326031 [of]
+56 979996705
joseantonio.vergara@gmail.com

Membro: S-ro Lee Jungkee: 401 dong 301 ho Dongpyun-ro 135, Dongan-ku, 431-907, Anyang-si, Kyungki-do, Korea. Resp. +82 10 3340 5936
esperanto@saluton.net

Membro: S-ro Stefano Keller, Case postale 6034, CH-1002 Lausanne, Svislando.
+41 76 261 06 09
kellerstefano@gmail.com

Observanto de TEJO: S-ro Nico Huurman

Observanto de ILEI: S-ino Mirejo Grosjean

Pri difinitaj aspektoj de la asocia politiko respondecas jenaj subteamoj (la gvidanto kursive): **Mastruma evoluigo** (financo, administrado, kongresa politiko): Fettes, Schäffer, MacGill, Lee. **Monda evoluigo** (eksteraj rilatoj, informado, esploro kaj dokumentado): Keller, Vergara, Fettes, Pietrzak. **Movada evoluigo** (landa kaj regiona agado, instruado, aktivula trejnado): MacGill, Pietrzak, Lee, Vergara.

Pli detale ĉe
www.uea.org/kiu/estraro.html

La Jaro Montevideo 60 daŭras

Restas la lastaj semajnoj en 2015 por plua engaĝo de la E-komunumo en la festado kaj laboro de la Jaro Montevideo 60, kies celo estas la konsciigo de la E-komunumo pri la valoro kaj atingoj de la unua rezolucio de Unesko pri Esperanto, kiu 60-jariĝis en decembro 2014.

Plej laste

Al la Jaro M60 estis dediĉita la publika prelego de la prezidanto de Japana Esperanto-Instituto SUZUKI Keiichiro, okaze de la 102-a Japana E-Kongreso en Sendai (10-12 okt. 2015). Krome, en ĉi tiu kongreso estis prezentitaj du aliaj prelegoj: de la sekretario de la Sendai-Unesko-Asocio, kiu estas la

unue fondita kiel privata Unesko-Asocio en la mondo (1947), kaj de reprezentanto de la urbo Wakayama. Ambaŭ parolis pri agadoj en la rilatoj inter Unesko kaj la E-komunumo en sia urbo.

70-jariĝo de Unesko

En la 16-a de novembro Unesko, la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, fariĝos 70-jara. Tio estas aparta okazo por iuj eventoj, des pli ke dum la Generala Konferenco de Unesko (03-18 nov. 2015) en Parizo, oni decidis pri la propono de Pollando, ke la 100-a mortodatreveno de L.L. Zamenhof (1859-1917) estu inter tiuj, kies priĝustadon Unesko aŭspicias en la periodo 2016-2017.

Pli frue, la 24-an de oktobro, la 70-an datrevenon solenis UN.

Pri tiu okazaĵo, dank' al Scott Turton

aperis omaĝa filmeto (<http://bit.ly/1PQt2h5>), nome, Fanfaro por ĉiuj Popoloj, kun subtekstoj el la oficiala E-traduko de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.

En la kunteksto de la ĵusaj datrevenoj kaj nia Jaro Montevideo 60 meritas la atenton grafika simbolo, kiu ligas tiujn jubileojn, ĉe <http://bit.ly/1LYFpBB>.

Retejo

Jam pli ol unu jaron ni klopodas labore priĝustigi la Jaron Montevideo 60. Kiel ni informis plurfoje, aparte dum la Lilla UK, dank' al Hector Tomás Díaz, el Peruo, kreiĝas retejo dediĉita al la Jaro M60, kies celo estas riĉe speguli laŭeble ĉiujn niajn aktivadojn. La ĉi-rilatajn raportojn, fotojn, ligojn mi daŭre atendas de ĉiuj. Bonvolu sendi raporton pri via agado al bpietrzak@onet.eu.

■ El la redakcio

TEJO-sukcesoj en Eksteraj Rilatoj

Dum mi skribas, fine de oktobro, Sasha Kovyazina (EU/Ukrainio) kaj Klara Ertl (EU) reprezentas TEJO ĉe la Junulara Forumo de Unesko en Parizo (EU), kaj elmontras viglan, profesian kaj kunlaboreman TEJO al la centoj da organizoj tie ĉeestantaj.

Lastan semajnon, Ana Ribeiro (Brazilo) estis oficiale invitita de Evoluiga Programo de UN (UNDP) partopreni kaj prelegi en la 3-a Monda Forumo pri Loka Ekonomia Evoluigo okazinta en Torino (EU) danke al la propono kaj subteno de TEJO. Ĵus Michael Boris Mandirola (EU), Tabea Maltry (EU) kaj Veronika Poór (EU) reprezentis TEJO en la tria Junulara Forumo de la Eŭropa Centro pri Paco kaj Evoluigo en Beogrado (Serbio). Ili prelegis pri la egaleca valoro de Esperanto kaj enpovigo de junularo.

Reprezentita de Fernando Maia (Brazilo), Namir Rodriguez (Dominika Respubliko) kaj Miko Brandini (Usono), antaŭ kelkaj semajnoj TEJO estis reelektita en la plenumorgano de Internacia Kunordiga Renkontiĝo de

Junularaj Organizaĵoj (IKRJO). La IKRJO-jarkunveno daŭris tri tagojn kaj okazis en Novjorko (Usono), apud la UN-pintkunveno pri la Celaro 2030 (paĝoj 228 kaj 229). IKRJO estas nuntempe konsiderata de UN kiel la voĉo de la junularo. Esti kerne de ĝi signifas ne nur esti plej proksime de la UN-sistemo kaj venigi al esperantista junularo voĉon kaj okazon engaĝiĝi, sed ankaŭ vidigi pri Esperanto dekojn da organizoj kaj milojn da junuloj, kaj elstarigi la gravecon de nia lingvo antaŭ la internacia politika junulara komunumo.

Francesco Maurelli (EU) partoprenis kaj prelegis en EU-Ĉina seminario pri junularo, kadre de la EU-Ĉina Altnivela Hom-Al-Homa Dialogo en Bruselo (EU). Pinto de la renkontiĝo estis kunveno kun la ĉina vicĉefministro Liu Yandong kaj Tibor Navracsics, la EU-komisionano pri edukado, kulturo, junularo kaj sporto. Dum la seminario, Esperanto estis prezentata kiel ponto inter la du kontinentoj, ilo por socia inkluziveco kaj konkreta eblo por altigi dungeblojn ĉe la junularo.

Kunlaboro kun Ĉina Radio Internacia, la Universitato de Esperanto en la Hai-Nan

Insulo kaj la teknologia pri-robota kunlaboro kun Chengdu estis prezentitaj, kaj novaj kunlaborebloj malfermiĝas.

Costanza Scönnel (EU) ĵus revenis el labora preparokunveno kun aliaj internaciaj junularaj organizaĵoj por la realigo de la Eŭropa Junulara Okazaĵo en Strasburgo (EU), en majo 2016.

Sasha Kovyazina (EU/Ukrainio) en la lastaj semajnoj reprezentis TEJO en Istanbul (Turkio) ĉe la Eŭropa Platformo pri Junulara Moviĝo, kaj en Bruselo (EU) ĉe laborgrupo de Eŭropa Junulara Forumo pri klimatsanĝo. Tiuj rezultoj estis konstruitaj per la agado de multaj senlacaj aktivuloj en Eksteraj Rilatoj, kiuj teame kaj entuziasme laboris kaj reprezentis TEJO en pluraj rekontiĝoj tra jaroj kaj kun la apogo de ĉiuj, kiuj subtenas la junan agadon por la internacia lingvo. Al la tuta komunumo ni forte dankas! Legu pli en la ĉi-numera Esperanto pri KER sur la paĝo 235. Se vi volas finance subteni la agadon de TEJO pri eksteraj rilatoj, bonvolu konsideri donaci tra UEA kun priskribo: "TEJO-KER". Pagmanieroj estas priskribitaj ĉe <http://uea.org/alighoj/pagmanieroj>

■ Francesco Maurelli

“Esperanto ne apartenas al la esperantistoj”

Paulo Lima esperantistiĝis en 1981 kaj en 1987 kunfondis E-eldonejon, nome Zamenhof Editores, sed post unu jaro forlasis la entreprenon por komenci karieron sur la kampo de propagando kaj merkato, kun granda sukceso. Li kabeis, sed antaŭ 10 jaroj decidis repreni sian E-vivon, post invito pri kunfondo de Intraespo — Monda Organizo por la Disvolvado de la Esperantista Ekonomio. Plej laste li fariĝis verkisto kaj baldaŭ aperos lia infanlibro en E-versio. Rilate la E-movadon, li ĉiam havis kritikan sintenon, ĉefe nuntempe, pro tio, ke post preskaŭ 30 jaroj kiel fakulo pri propagando kaj merkato, li akiris apartajn kapablojn interpreti kaj taksu la agadon de la esperantistoj sur la kampo de diskonigado de nia lingvo.

Fabrizio Valle

FV: Kiel vi vidas Esperanton en la nuntempa tutmonda kunteksto?

PL: Pli ol jarcento pasis kaj ne restas duboj, ke Esperanto solidiĝis kiel

konkreta idiomo, kvankam la ĝenerala percepto — de la ĉiamaj kritikantoj kaj de tiuj kiuj tute ignoras la faktojn — estas tute alia. Sen publika aŭ korporacia investado kaj sen vigla ritmo de alkonsuma produktado, impulsata nur de la ebloj pri interŝanĝo inter diversnaciaj homoj, ĝi sukcesis kreski kaj plu senhalte kreskas kaj vivas. Ĝi enradikiĝis en internacia komunumo. Mi ne estas historiisto, sed mi kuraĝas diri, ke antaŭe ne ekzistis alia lingva eksperimento komparebla kun Esperanto, se paroli pri ĝia plensukcesa kapablo rezisti al la naturaj malfacilaĵoj kaj kontraŭstaro de la socio.

1

FV: Kvankam vi ĉiam flegis grandan pasion pri Esperanto, vi aliflanke ĉiam havis kritikan sintenon rilate la E-movadon. Kial?

PL: Ekde la naskiĝo de la internacia lingvo, speciala speco de homoj — kiu poste grupiĝis kiel movado — prenis Esperanton kiel sian propran, kun humanistaj principoj, interna ideo kaj eĉ propra himno, kvazaŭ temus pri io rilatanta al nacio aŭ lando. Tio rolis grave, eĉ fundamente, por la unuaj jardekoj, kiam la pretervivado de la idealo pri internacia lingvo estis atingenda celo kaj Esperanto ankoraŭ estis febla fenomeno. Sed malgraŭ, ke spuroj de tiuj ideoj kaj kutimoj ankoraŭ tre viglas, la nuna kunteksto estas tute alia kaj ni devas adaptiĝi al ĝi, per sinteno pli malferma.

2

FV: Do, ĉu la tradicia movado ne plu havas senceon, ne estas por ĝi loko en la nuntempa mondo? Ĉu tion vi volas diri?

PL: Ĝia granda merito estis teni la ligforton por rezisto al la malfavoraĵoj de tempo kiam post unu granda milito sekvis alia. Sen la interna ideo, sen la movado kaj ĝia preskaŭ religia sinteno, certe la esperantistoj estus dronintaj kaj Esperanto estus hodiaŭ nur glora citaĵo en la historio de la planlingvoj. Ni ĉiuj estas dankemaj al la troa konservativismo de la E-movado! Tamen, nuntempe ni bezonas tute novan sintenon, novan elanon, novan aferon.

3

FV: Bonvolu klarigi vian pensmanieron.

PL: Jam venis la horo por kvalita salto de Esperanto: ĝi eliru el la manoj de revulioj, kiuj vidis en ĝi idiomon naskiĝintan por unuigi frate la popolojn, kaj anstataŭ tio, ni traktu Esperanton kiel idiomon naskiĝintan por fariĝi efektiva ponto inter ili. La ponto estas konstruita, fortas kaj estas laŭpruve ja sekura. Nun venos tiuj, kiuj trovos proprajn ideojn la diversajn manierojn trairi ĝin senlime. Ĉiu laŭ sia prefero; kelkaj sole, aliaj karavane. Rajdante sur ĉevaloj, per tanko aŭ fortika kamioneto. Sur tiu nova scenejo, la internacia lingvo ĉesos esti ies propraĵo aŭ pasiva rimedo de diskonigado de kongresoj kaj kursoj kaj fariĝos efektiva ilo de manifestacio de sia parolantaro, kiu uzos ĝin kiel instrumenton por krei siajn proprajn enhavojn, aspiro al tute propra

4



celaro. Ĉu celoj honoraj aŭ fiaj, bonfaraj aŭ ne, tute ne gravas.

FV: Ĉu vere ne eblas harmoniigi la du aferojn: tradicion kaj novigon?

PL: Mi klarigos: Unu el la kialoj de tio, ke Esperanto ankoraŭ ne konkeris la mondon kiel ni revas, ŝuldiĝas al la fakto, ke ĝi ankoraŭ estas ies tero. Por ke ĝi antaŭeniru — kaj pri tio ni ne povas marĉandi — ĝi devas fariĝi nenies tero, tio estas, de ĉiuj vivantoj, inkluzive de anĝeloj, demonoj kaj eksterteruloj, se ili ekzistas. Mi parolas pri ĉiuj, senescepte: la seksa maniulo, la altruisto, la kapitalisma porko, la suĉinfano kaj plenaĝuloj, la psikopatoj, la naturdefendantoj kaj la pacifistoj, la politikistoj kaj la ascetoj. Eŭropanoj, afrikanoj, azianoj, la okcidentanoj kaj orientanoj, la indiĝenoj kaj ĉiuj ceteraj, ĉiuj kun egala rajto pri Esperanto. Ĉiuj devas havi la rajtojn je uzo kaj manifestiĝo rilate tion, kio Esperanto estas: komunuza idiomo. Mi parolas pri dolora procezo de malproprigo, al kiu rezistas ĉiuj malnovaj “posedantoj” de la lingvo. Sed tiu malproprigo nepre devas okazi, por ke novigemo antaŭu tradicion. Tion povos akceli la novaj kapoj aspirantaj al la gvidado de la movado. Ili prenu sur sin la avangardon kaj decidu kion fari. Kaj ni koralligiĝu al nenio, lasante ilin marŝi antaŭen, ĉar Esperanto ne plu povas aparteni nur kaj ekskluzive al la esperantistoj. Fakte, Esperanto ne apartenas al la esperantistoj.

FV: Kiu estas la celpubliko de merkatura strategio por Esperanto?

PL: Ĉiuj publikoj senescepte, se ni unuamamente konsentos, ke temas pri idiomo kiel ĉiuj aliaj. Gravas, ke la strategio enplektu la grandan potencialon de la reta medio je nia dispono kaj okupu la spacon en la sociaj retoj. Abundas esplorindaj niĉoj kaj ĉiu bezonas propran strategion. Tion mi povas priskribi en aparta artikolo. Pri unu afero ni ne dubu: la estontaj esperantistoj tre feliĉos pro la malkovro, ke Esperanto multon povos doni al ili, samkiel ili povos multon profite fari por Esperanto, en favora kunĉenado de cirkonstancoj. Ĉu ŝajnas ludo de intereso? Jes, la homo moviĝas pro intereso.

FV: Via aserto, ke Esperanto estas lingvo kiel ĉiuj aliaj certe ne plaĉos al granda parto de la legantaro de la revuo Esperanto. Certe ili prifajfos viajn ideojn. Kion vi volas diri al tiuj legantoj?

PL: Necesas vidi per la okuloj de la neesperantista publiko. Dum Esperanto estos traktata de ni kiel eksterordinara lingvo, la neesperantistoj ne sufiĉe atentis pri ĝi, enmarĝenigos ĝin kaj plu opinios, ke ĝi estas lingvaĉo parolata de deko da fantaziuloj, kiu mortis sed insistas esti traktata kiel serioza lingvo. Tiuj homoj unuavice serĉas nur idiomon kiu taŭgu por iliaj tre diversaj kaj konkretaj bezonoj. Se Esperanto havas aliajn kvalitojn — kaj vere ĝi havas, multajn kaj unikajn! —, tio estos bonvena kaj dankinda surprizo, io plia, kiun ni altrudas kiel la unuan ofertatan kvaliton. Ĉu ne estus pli saĝe paroli pri tiuj kvalitoj poste, en la sekvo de la baza instruado? Kompreneble, atingi tiun senprivilegian pozicion en komuna loko bezonas tempon. Gravas, ke ne estas horo por defendi tion, kio por ni estas ege aprezata kaj ĝusta, sed horo por elsarki el nia movado aferojn ne plu utilajn. Ĉu mi eraras? Eventuale jes ja, sed tion ni scios nur post funda kaj serioza debato, el kiu ni povas lerni gravajn lecionojn. Esperanto bezonas, ke ni urĝe forigu la ŝlimon de niaj ideoj, labormetodoj kaj asociaro. Bonvolu ekkomenci!

FV: Ĉu viaj opinioj baziĝas sur nur sperto aŭ ankaŭ sur observado?

PL: Iomete sur ambaŭ, sed ĉefe sur memkritiko. En la 1980-jaroj mi kabeis kaj jen post reaktiviĝo, antaŭ 10 jaroj, mia unua demando estis: “Kial, ĝustadire, mi enhaveniĝis en insulo kaj lasis la ŝipon forveturi?” De tiu sindemandado mi rimarkis, ke malmulto ŝanĝiĝis dum mia kabeado, kaj estis tre klaraj signoj, ke io maltrafa daŭradas. Mi observis kaj analizis — ja kun la sperto de la longe harditaj homoj — kaj ĉio pliklariĝis: mi sentis la neceson renoviĝi kaj miaopinie tio same aplikeblas al la movado.

FV: Revene al la temo “propagando”, kion ni pli funde ekspluatatu en la diskonigado de la E-kursoj?

PL: Mi ĉiam entuziasmis pri

la propedeŭtika valoro de Esperanto, ĉu pri ĝia praktika flanko, ĉu pri la strategia. La praktiko pruvis, fakte, ke Esperanto taŭgas por la propedeŭtika celo. Mankas nun uzi tiun raran econ, kiun manaĝero aŭ propagandisto nomus kompara aŭ konkura avantaĝo, profite al nia strategio. Pro tre simpla kialo: la homoj volas kaj bezonas lerni idiomojn (spite ĉiujn frakasitajn klopodojn subteni la ideon, ke la lingva problemo estas solvita per la angla lingvo), en periodo ĉiam pli mallonga kaj ĝis alta rego, celante plenumon de merkataj postuloj. Enkonduki Esperanton kiel pontolingvon en la instruadon de plej diversaj naciaj lingvoj levos ĝian popularecon al nivelo neniam antaŭe atingita. Alivorte: ni devas malpli emfazi la “moralajn valorojn” de Esperanto, pri kiuj la homoj ne multe interesiĝas aŭ eĉ ne kredas, kaj reliefigi ĝiajn “aldonitajn valorojn”, kiuj certe allogos ilin. Ekzistas multe da allogaĵoj, sed la propedeŭtika valoro estas sendube ekzemplo de esplorinda kompara avantaĝo. Kio? Ĉu enmiksiĝo de Esperanto en la ekonomia tutmondiĝo kaj influo de merkataj postuloj? Ekzakte! Ne pro tio, ke mi volas, ke tiel estu, sed ĉar en la tutmondiĝinta nuntempa socio tiel estas.

FV: Antaŭe vi aludis al “iuj novaj kapoj aspirantaj al la gvidado de la movado”. Pri kiuj kapoj temas?

PL: La nuna mondo estas tre dinamika kaj interkunlabora. Ju pli da homoj sentos sin parto de la movado, des pli ili ĝin plifortikigos. La ĉefa agado, do, estu afero de tiuj, kiuj havas la povon transformi la nunon, modlante la estonton: la junularo. En ĉi tiu decida momento, neniu pli funde kaj lerte komprenos la disponeblajn ilaron kaj rimedaron kaj kun ili rilatiĝos ol la gejunuloj. La interreto plenplene viglas kaj estas medio kie Esperanto povos ekspansii en formo antaŭe malebla. Nu, kial ili ankoraŭ ne prenis sian ĝustan lokon en la E-movado? Ĉar ni estas dinosaŭroj atendantaj meteoron, baraktantaj kontraŭ estingiĝo kaj tiel fermantaj la pordojn al la novumo. Kiom naivaj ni estas! La meteoro jam venis: la novepokaj gejunuloj. Horo por liberigi la vojon kaj lasi ilin agi. Ĉu ili eraras? Jes, kiel ni same eraris dum jardekoj, sed iliaj trafoj estos pli efikaj kaj decidaj en la kuranta jarcento, kiu certe estas la jarcento de la entreprenismo, de la novigo, de la dezajno kaj de la plena konektivado.

Eventoj en Perspektivo

Por informiĝi pri ĉiuj E-eventoj tra la jaro, bonvolu viziti la jenajn servojn:

- Internacia kalendaro de Esperanto-aranĝoj
 - Kompilita ĉe Esperanto-Centro Eventoj en Budapeŝto <http://www.eventoj.hu>
 - Kalendaro de Esperanto-aranĝoj
 - Subtenata de Eldonejo Impeto, Tutmonda Esperanto-adresaro kaj Fabelaj Mondo
- http://esperanto.com/esperanto_mondo

Eventoj kun AMO



Post intensa laboro kaj planado la programo de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO), lanĉita en 2013, plene maturiĝis. En la rubriko "Eventoj en Perspektivo", kiu de nun anstataŭigos la tradician rubrikon "Kalendaro", regule aperos koncizaj informoj pri AMO-seminarioj, sendepende de pli longaj artikoloj pri ili, kiuj eventuale aliloke aperos en *Esperanto*.

Ĉi-sube ni listigas la eventojn kadre de kies programoj okazos AMO-seminarioj.

6 - 10 januaro

Poludnica 2016 en Záva ná Poruba, Slovakio: renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj kaj turistoj.

Pri AMO 18

Temo: Kiel organizi E-vojaĝojn kaj turismajn ekskursojn.

Gvidantoj kaj temoj:

- J. Vajs (SK): Diferencoj inter vojaĝoj organizitaj de vojaĝoficejoj kaj de esperantistoj;
- D. Rodzianko (PL): Kiel vojaĝi malmultekoste;
- M. Blahuš (CZ): Geografiaj konkursoj dum renkontiĝoj de E-vojaĝantoj kaj turistoj;
- V. Radovanović (HR): Multjaraj spertoj kun organizado de regulaj turismaj renkontiĝoj;
- A. Zdechlik (PL): Organizado de E-vojaĝoj al malproksimaj landoj;
- P. Chrdle (CZ): Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de E-vojaĝoj.

La seminario okazos memore al Andreo Grzębowski – ja en aprilo 2014 ni planis kun li fari tiun AMO-seminaron en Bydgoszcz.

■ Ján Vajs, LEK (SMOPaJ), Školská 4, SK-031 01 Liptovský Mikuláš, Slovakio

■ www.poludnica.esperanto.sk aŭ poludnica83@gmail.com

26 februaro - 8 marto

Dua Speciala Ekskurso en Katmandu, Nepalo:

Kontraste kun la tradiciaj Himalajaj Renkontiĝoj (kiuj signifas longan perpiedan marŝadon), ĉi-foje NEspA okazigos aŭtobusan ekskurson al famaj nepalaj turismaj lokoj, inkluzive de la fama montaro videbla en Katmanduo, Ĉitaŭan Nacia Parko, Nagrakot, Dulikhel kaj Pokhara.

Pri AMO 20

Katmanduo, de la 27-a ĝis la 29-a de februaro. Inter la gvidantoj: Hori Jasuo (Japanio),

Trezoro (Ĉinio), Bharat Ghimire (Nepalo).

■ Nepala Esperanto-Asocio (NEspA), G.P.O. Box: 10518, NP-102 Kathmandu, Nepalo

■ nespa.1990@gmail.com

22 - 26 Januaro

51-a Brazila Kongreso de Esperanto en Manaus, Brazilo: Manaus estas brazila urbo proksime de la enfluo de la rivero Negro en la riveron Amazono. Ĝi situas nur kelkdek kilometrojn de la ekvatoro kaj havas ekstreme tropikan klimaton. Ĝi estis fondita en 1669 de portugalaj koloniantoj. Temo: Verda Komunikado: kiun internacian lingvon oni uzu en daŭripova mondo?

Pri AMO 19

Kadre de la 51-a BKE, AMO eniras Amazonion, kun la temo "Esperanto: komunikilo por daŭripova mondo". Gvidantoj: Fernando Maia Jr., Lucas Barbosa, Alvaro Motta.

■ Brazila Esperanto-Ligo, ĉe <http://bit.ly/1GE0Qe5>

Komuna aranĝo



23 - 28 Marto

Trilanda Kongreso en Bandung, Indonezio:

Trilanda kongreso inter Aŭstralio, Indonezio kaj Nov-Zelando. Realigante la ideon de kunlaborado, la Esperanto-asocioj de Aŭstralio, Indonezio kaj Nov-Zelando okazigos trilandan kongreson en Bandung, Indonezio, de la 23-a ĝis la 28-a de marto 2016. La urbo Bandung estas elektita pro sia rolo kiel loko de la historia "Konferenco Azio-Afrika" en 1955. Tiam reprezentantoj de 29 landoj interdiskutis diversajn aspektojn rilate al homaj rajtoj, egaleco kaj paco, aferoj ankaŭ ĉe la kerno de Esperanto. Krome, nuntempe troviĝas multaj gejunuloj kiuj studas Esperanton sub la gvido de la loka Muzeo de la Konferenco Azio-Afrika.

La riĉa kongresa programo inkluzivos diversstemajn prelegojn, ekskursojn al vizitindaj lokoj, artajn aranĝojn, ekspozicion kaj Esperanto-kursojn en du niveloj. Okazos ankaŭ antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj al aliaj partoj de Indonezio.

■ Ilia Sumilfia Dewi, ĉe iea@esperanto.org aŭ aea.esperanto.org.au/kongreso.



Junularo



15 - 20 januaro

7-a NOVA - Novjara Aranĝo en Presidente Figueiredo kaj Manaus, Brazilo: festu, promenu kaj amuziĝu dum la unua NOVA en Amazonio, plena je naturaj belaj.

■ Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO), ĉe bejoesperanto@gmail.com

Diversaj



5 - 12 marto

Mediterranea Esperanto-Semajno en Les Issambres (Lazura Marbordo), Francio.

■ Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio, prezmoni@hotmail.com, tel. +33(0)4 94 83 06 88 aŭ Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du Progrès, FR-83600 Fréjus, Francio

■ kris_grai@hotmail.fr; tel. +33(0)4 94 95 66 18

25 marto - 1 aprilo

Printempa Semajno Internacia (PSI) en Bad Hersfeld, Germanio.

■ Germana Esperanto Asocio, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin, Germanio
■ petra.dueckershoff@esperanto.de

28 marto - 6 aprilo

Ekskurso tra Irano al Urgup (Turkio) en Borugxerdo-Irano: urboj por ekskursoj: Teheran-Antalya-Konya-Urgup-Konya-Tehran.

■ FOTROS Tour&Travel Agency, No.36, 1 St floor, Eastern Sepand St, NEJATOLLAHI Ave, Tour&Travel Agency, Irano
■ masud8422@yahoo.com

1 - 4 aprilo

9-a Mezorienta Esperanto-Kunveno en Ürgüp, Turkio.

■ <http://bit.ly/1Mf6yPZ>

14 - 16 aprilo

Israela Kongreso en Jafo, Israelo.

■ eli@esperanto.org.il

20 - 24 aprilo

Korusa Renkonto de Interkant en Baugé, Francio.

■ Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio

■ kastelo@gresillon.org

UEA-ano de la unua horo

■ Hans Bernd Ashauer-Jerzimbek

Paul Tarnow, germana esperantisto, vivis de 1881 ĝis 1944 kaj laboris kiel inĝeniero de konstruo mekanika precipe en ŝtataj institutoj. Esperantiĝinte dum sia studado ĉirkaŭ 1907, li baldaŭ entuziasme propagandis Esperanton en pluraj lokoj de la norda parto de Germanio, aktiviĝis en germanaj Esperantaj institucioj kaj samtempe partoprenis la fondon de UEA en 1908 (ĉio ĉi laŭ liaj propraj informoj en *Enciklopedio de Esperanto* de 1934, kies ĉefkunlaboranto li estis).

Post la Unua Mondmilito li okupiĝis pri sia arkivo de periodaĵoj de la internaciaj lingvoj (Esperanto, Ido, Volapuko ktp.), kiun li komencis en 1910. Ofte li laboris kune kun József Takács, ekzemple por la *Katalogo de la Esperanto-gazetaro* (1934) kaj inter ili estiĝis amikeco. Sian bibliografian kaj kolektan laboron interkomunigis Paul Tarnow kun 10 000 aliaj anoj de internaciaj lingvoj, kiel József Takács skribis. Tiamaniere en 1934 la gastama Tarnow – edzo, patro de kvar infanoj kaj sukcesinta inĝeniero de konstruo mekanika de la Rejna provinco en Düsseldorf – iĝis sufiĉe konata persono en la germana kaj en la tutmonda Esperantujo.

Arestita de gestapo

La 11-an de aŭgusto 1934 Paul Tarnow estis arestita en “protektarestado” de la Gestapo pro suspekto pri spionado. Li estis liberigita la 21-an de decembro 1934, verŝajne post penplenaj klopodoj de iu lia konato. En 1935 József Takács eksciis pri la arestado, ĝia kaŭzo kaj la sekvoj, nome, ke la Gestapo “traserĉis liajn oficejon, loĝejon, kaj korespondaĵojn, kiuj konsistas el 25 000 pecoj” trovante nenion; malgraŭ tio “ne rehonorigis lin kaj ne redonis lian oficon, eĉ malpermesis al li la rajton kaj eblon defendi sin kontraŭ la mensoguloj kaj kalumniantoj.” Tion József Takács skribis – unu kaj duonan jarojn post la aresto de

Paul Tarnow – en hektografita cirkulero, titolita “La martira sorto de samideano Paul Tarnow aŭ la esperantista Dreyfus-afero”. Li petis per la cirkulero, ke “la esperantistaro amase protestu kontraŭ la martireco de sinjoro Tarnow” kaj pri lia familio por “redoni al ili la viveblecon kaj la senkaŭze makulitan honoron”. Sed tio sukcesis pli frue ol oni atendis en novembro 1935 – ankaŭ ĉar Paul Tarnow petis permeson daŭrigi la kolektadon pro sciencaj kaŭzoj de la koncerna ministro kaj ricevis ĝin.

Redono de ofico

En 1936 oni redonis lian oficon. La kolektado montriĝis esti tre komplika ĉar plurajn fojojn li devis veni al Gestapo pro aŭskultado pri suspektataj, alsenditaj broŝuroj el eksterlando – denove en aprilo 1940. Paul Tarnow petis urĝe, ke li povu daŭrigi la kolektadon. Li skribis al la sekreta ŝtata polico de Düsseldorf: “Mi ankaŭ volas atentigi pri tio, ke kredeble estas neniu dua germano, kiu havas tiajn plurajn personajn rilatojn en la plimulto de la landoj de la mondo kiel mi kaj ke oni do devas daŭrigi tiajn rilatojn.”, sed devis ĉesi demandi pri alsendoj el eksterlando.

En marto 1943 li suferis apopleksion. Dum aeratakoj, kiuj – laŭ liaj vortoj en letero al la direktoro de UEA, Hans Jakob, en Ĝenevo de la 1-a de majo 1944 – martiris lin tage kaj nokte, liaj handikapoj ĝenis lin fuĝi en la kelon. Li provis savi la arkivon per evakuado en bunkro, kun oficiala subteno de la respondeca ĉef-arkivisto, Wilhelm Kisky. Laŭ la taksado de Tarnow tiam estis la kvara plej ampleksa arkivo de Esperantaj periodaĵoj de la mondo (el tiu menciita letero). 4900 kilogramoj da dokumentoj estis pakitaj en 45 kestojn kaj alsenditaj al bunkroj.

En la fino de 1944 li ofte tranoktis en sia oficejo, ĉar tie li povis fuĝi en la bunkron



Paul Tarnow

per lifto. Li mortis en la oficejo la 13-an de decembro 1944 pro plua apopleksio. 16 kestoj estis enmetitaj ĉirkaŭ 1952 en la stokon de la biblioteko de la Universitato de Kolonjo (Hans Wingen: Publika Esperanto-libraro en Kolonjo; Germana Esperanto-Revuo 12/1953), nun kun enhavlisto tie facile troveblaj per interreto. La aliaj kestoj malaperis. Lia amiko József Takács, juda, hungara dentkuracisto, jam mortis antaŭ li, kune kun sia filino mortpafita de hungaraj faŝistoj la 16-an de oktobro en 1944.

Nur en 1955 en Nederlando kaj Germanio kaj en 1995 kaj en 2002 en Germanio io estis skribita por honorigi Paul Tarnow.

Kadre de peto de stratnomado laŭ Paul Tarnow al la Düsseldorf-a magistrato aperis en mia germanlingva artikolo “Konfeso al malfermeco por la mondo kaj amikeco. Memorigo pri la esperantisto Paul Tarnow (1881-1944)” en loka kaj regiona historia jarlibro “Düsseldorfer Jahrbuch 2015”. En junio la jarlibro estis prezentita okaze de gazetara konferenco. Ĉeestis ankaŭ la filo de Paul Tarnow.

La esperantistaro tutmonda – la rondo alt-estimata de Paul Tarnow – estas adresita de tiu ĉi artikolo por sciigi ĝin pri lia sorto.

Kalejdoskopo



Persone: Scott Turton UN/Unesko-videoj.

La intervjuo kun Renée Triole en la revuo *Esperanto* (decembro 2014) instigis min eklabori por la esperantigo kaj subtekstigo de UN/Unesko-videoj. Mi klare sentis, ke mi povus iel helpi rilate tiuspecajn videojn. Ĉar tiam mi jam kunlaboradis kun Robert Poort, el Esperanto-TV, mi kontaktis lin kaj eklaboris. Alia membro de la teamo de Esperanto-TV, Antonio Codazzi, helpas min traduki la videojn en Esperanton.

Mi daŭre prilaboras videojn de UN, Unesko kaj aliaj, kiujn Robert recenzas. Espereble aliaj esperantistoj sin prezentos por kunlabori. Lastatempe mi kunlaboris ankaŭ kun Stefano Keller kaj rezulte estas ekzemple videoj de gravaj Unesko-mesaĝoj kiel “Monda Tago de Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo” kaj “Monda Tago de Instruistoj”. La jutub-kanalo de la UN/Unesko-videoj estas United Nations - Esperanto, ĉe <http://tinyurl.com/UN-videoj>.

Ni semas

Kandidatigo de projektoj

La oktobra numero de *Esperanto* prezentis la novan programon de UEA “Ni semas”. Jen la uzenda retadreso por peti pliajn informojn aŭ por kandidatiĝi projekton ĝis la 15-a de novembro: nisemas@co.uea.org

■ Stefan MacGill



Tago de Homaj Rajtoj

Komuna idealo atingenda por ĉiuj

La 10-an de decembro 1948 estis proklamita la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* (<http://goo.gl/y6XDJ0>). Ekde 1950 ni festas la 10-an de decembro “Tago de Homaj Rajtoj”, por enfokusigi la atenton al la Deklaracio, kiel komuna idealo atingenda por ĉiuj. Ni levu niajn voĉojn por ke digna homa vivo eblu “same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.”

La ĉefsidejo de la Oficejo de la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj en Ĝenevo (<http://www.ohchr.org> — kreita en 1993), estas tutmonda aŭtoritato de UN pri homaj rajtoj. Agadas tie la reprezentantoj de UEA, kiel kunlaboranta NRO. Krom disvastigo de Esperanto, agado por solvi la lingvan problemon en internaciaj rilatoj, UEA laŭstatute celas plifaciligi ĉiuspecajn spiritalajn kaj materiajn rilatojn inter homoj, malgraŭ diferencoj interalie lingvaj. Por tiuj celoj ĝi kunlaboras kun similcelaj asocioj.

■ Stefano Keller



Pupteatro

Senlima

Senlima estas nova pupteatraĵo kun Esperanta titolo, kiu uzas tradician pupteatron kombinitan kun animacio kaj videoprojektado. Ĝi prezentas rakonton malrekte ligitan al la temo “limoj” kaj fakte ankaŭ ligitan al la nuntempaj problemoj rilate al la rifuĝintara krizo en Eŭropo. Ĝi ekestis antaŭ nelonge en Indonezio kiel kunproduktaĵo de du pupteatraj trupoj el du landoj: Futuristentheater el Berlino, Germanio, kaj Papermoon Puppet Theater el Yogyakarta, kiu estas la plej fama kaj plej populara nuntempa pupteatro en Indonezio.

■ Herman Deceuninck



La 15-de decembro Zamenhof-Tago: vivu la Esperanta libro!

La 15-a de decembro estas la naskiĝtago de L.L. Zamenhof (1859-1917), kreinto de Esperanto. Laŭ iniciato de signifa E-verkisto, Julio Baghy, ni festas en tiu dato ankaŭ la Esperantan kulturon. Por plialtigi la spiritalan nivelon de la esperantistaro, li proponis ke la *Zamenhof-tago* estu ankaŭ la tago de la Esperanta libro.

Per kultura evento lokaj grupoj informu ne-esperantistojn pri la internacia lingvo kaj ĝia abunda literaturo originala kaj tradukita. Ni elmontru, kiel nia movado diskonigas kulturverkojn de ĉiuj originoj, ebligante la reciprokajn ĝuadojn de verkoj. Tio estu nia Zamenhof-taga kontribuo al justa, egalrajteca komunikado, kiu respektas lingvan kaj kulturalan diversecojn, strebe al daŭripova konservado de tiuj riĉaĵoj, rajtoj.

Krom okazigo de kunvenoj, prelegoj pri Zamenhof, ni celebru la Esperanto-literaturon ankaŭ per aĉeto, legado de nova libro.

■ Stefano Keller



Sekvu la revuon *Esperanto*. Vi estos inter la unuaj ekscii pri la novaĵoj:

twitter.com/revuo_esperanto



Monda Pufestivalo 2015

Bela festivalo kun bona rikolto

En la mirinda nombro de 15 000 vizitantoj finiĝis la 5-a Monda Pufestivalo en la urbo Higashikagawa (32 000 loĝantoj). Al tiu sukceso kontribuis 15 mencioj en la japanaj amaskomunikiloj kaj pliaj informoj en ĵurnaloj, TV kaj radio eksterlande.

La pupkolekto nun konsistas en 1 390 pupoj kun tradiciaj kostumoj el 70 landoj, danke al la tutmonda esperantistaro.

Inter la francaj pupoj troviĝas ekzempleroj mane faritaj el diversaj regionoj de la lando: porcelanaj pupoj, riĉa kolekto de provencaj statuetoj, pupoj portantaj tradiciajn robojn de diversaj regionoj kaj eĉ pupojn de la reĝinoj Marie-Antoinette kaj Anna de Bretonio, plejparte donacitaj de gesinjoroj Lafargue, el Parizo. Plie, estis donacitaj trideko da pupoj el 15 landoj, kiel Hispanio, Italio, Peruo.

La gastoj estis bonvenigitaj en la ĉefsalono per bildo de Catherine Deneuve, farita de amatora pentristo, kaj afiŝoj pri diversaj francaj regionoj. La pupoj estis montrataj en budoj tra la urbo kaj ĉie estis fotoj kaj informoj pri la Mondaj Kulturaj Heredaĵoj (laŭ listo de Unekso) en la 70 landoj partoprenantaj la festivalon.

Speciala gasto estis la franca kantisto Jomo, kiu ĉiutage koncertis kaj dancigis la ĉeestantaron. Li estis menciita en la *Libro pri Rekordoj (Guinness)* pro kantado en 22 lingvoj en la jaro 2000. La kulturan



programon kompletigis dancoj fare de lokaj grupoj: flamenka (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Flamenko>), havajaj, ventra kaj folkloraj dancoj. Virina grupo, krome, rakontis fabelojn al infanoj kaj ventroparoladis. Plie, 40 budoj ofertis ampleksan menuon de internaciaj pladoj.

La enketiloj montras, ke 2/3 el la vizitantoj estis virinoj; 60,1% estis pli ol 50-jaraj; 53,4% konsideris ĝin ege bona kaj 46% bona. Ankaŭ infanoj povis lerni pri la mondo kaj kulturaj diferencoj! Ili esprimis la deziron estonte vidi pupojn interalie el Nordameriko, Anglio, Japanio, Rusio, Germanio kaj pupojn de historiaj homoj kiel Anne Frank, F. Nightingale, Hans Christian Andersen kaj aliaj.

La pupekspozicio estas evento ĉiujare organizata de la Komitato por la Monda Pufestivalo <http://world-doll-festival.org/>. Ĉi-jare ĝi kalkulis pri la aŭspicio de la Ambasado de Francio en Japanio, la Japana-Franca Instituto, Universala Esperanto-Asocio kaj Esperanto France.

■ Etsuo Miyoshi



UMEA

E-medicinistoj per skajpo

La 24-an de oktobro okazis la **1-a Medicina Skajpkonferenco** laŭ ideo de Roberto Cutiño, familia kuracisto el Kubo, kiu kunordigis la eventon, kaj Denice Maldonado, fakulino pri rekapablado, el Meksiko. Entute naŭ gekolegoj partoprenis la konferencon, unu el Usono, unu el Kubo, du el Kolombio, kvar el Meksiko kaj unu el Germanio. Dum preskaŭ duhora retkunveno ĉiuj partoprenantoj havis la eblon dum 5-10 minutoj rakonti pri si mem

kaj pri sia individua laborkampo. Krome, estis prezentitaj mallongaj raportoj, ekzemple pri la signifo de la "internacia tago de psika sano", en la 10-a de oktobro, laŭ iniciato de la Monda Organizaĵo pri Sano (MOS - <http://bit.ly/1Rw1Bq9>), la medicina prizorgo de rifuĝintoj en Munkeno (Germanio) kaj la agado de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). Per skajpo aktualaj medicinaj vortaroj estis ĝisdatigitaj. La evento tiel entuziasmigis la partoprenantojn, ke oni decidis plu okazigi retkunvenojn regule ĉiun duan monaton. La organizantoj ĝustatempe anoncos la duan konferencon.

■ Christoph Klawe - c.klawe@web.de



UEA-servo

Abontarifoj 2016 de la libroservo de UEA

(prezoj en eŭroj)

Titolo	n-roj jare	jara abono
Brita Esperantisto	2	14,00
Esperantisto Slovaka	4	10,00
aerpoŝta aldono		1,00
Esperanto (revuo de UEA)	11	41,00*
Esperanto, L' (itala)	6	28,00
Espero, La (sveda)	6	22,00
Espero Katolika	4	35,00
aerpoŝta aldono		12,00
Internacia Pedagogia Revuo	4	24,00
Israela Esperantisto	2	10,00
Jaro, La (agendo)	1	6,00
aerpoŝta aldono		3,00
Juna Amiko (por lerneĵanoj)	4	18,00
Kancerkliniko, La (ajnista)	4+1	27,50
Kontakto (revuo de TEJO)	6	25,00*
Lang. Problems & Lang. Planning institucioj	3	70,00
Monato (novajmagazino)	11	55,00
aerpoŝta aldono		5,00
elektronika versio		33,00
Monde de l'esperanto, Le (franca)	4	30,00
Ondo de Esperanto, La	11	42,00
aerpoŝta aldono		5,00
elektronika versio		15,00
Starto (ĉeĥa)	4	11,00
aerpoŝta aldono		3,00
ekster Eŭropo		13,00
Tempo (kroata)	4	10,00

* La abonprezoj de UEA/TEJO-revuo varias laŭlande. Konsultu la kotiztabelon de UEA. Por ĉiuj gazetoj la abonantoj en Eŭropa Unio aldone pagas imposton de 6%. Aboni eblas ĉe <http://katalogo.uea.org/index.php?st=abonoj>. Informoj validaj je 2015-okt-09.



Daŭripovo: ŝancoj kaj minacoj

■ **Mark Fettes**

Esperanto kaj ĝia movado estas integre ligitaj al la ĝenerala evoluo de la monda socio. Oni povas distingi ĝis nun kvar ĉefajn fazojn en tiu rilato:

- 1900-1914: Esperanto en vasta ondo de internaciaj kontaktoj, vojaĝado, idealismo
- 1920-1939: Esperanto en naciaj kaj internaciaj movadoj por egaleco, modernigo, socialismo
- 1950-1989: Esperanto en streboj por paca internacia ordo, bazita sur homaj rajtoj kaj internacia juro
- 1990-2015: Esperanto en epoko de tutmondiĝo, disvastiĝo de interreto.

Sed estas plia aspekto de tiu lasta fazo, kies graveco konstante kreskas, kaj pri ĝi mi volas paroli hodiaŭ. Nome, la koncepto de “daŭripova evoluigo”.

La termino estis monde diskonigita en 1987, kiam komisiono de UN publikigis la raporton Brundtland, “Nia komuna estonteco”. Temis unuavice pri kritiko de la postmilita koncepto pri ekonomia kaj socia evoluo surbaze de senlima kresko laŭ la modelo de la okcidentaj kaj industriaj landoj.

La signifo de “daŭripova evoluigo” estas kompleksa kaj pridisputata. Tamen, la kerna ideo estas relative senproblema. Oni foje parolas pri “triopa bilanco” por daŭripovaj entreprenoj: financa, ekologia kaj socia. Simile, daŭripova socio estu prospera, naturkonserva kaj justa.

La promesoj kaj mankoj de Celaro 2030

La 11-an de aŭgusto 2015, la komisiono de Unuiĝintaj Nacioj taskita pri la preparado de nova tutmonda evoluiga strategio prezentis sian raporton al la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo, kiu en septembro pritraktis ĝin.

La raporto prezentas 17 celojn sub la titolo “Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo”. Temas pri sekvo al la Jarmilaj Evoluigaj Celoj, 1990-2015. Unufoje la ideo de daŭripova evoluigo fariĝis kerna por la tuta UN-sistemo.

Multaj celoj emfazas materiajn kondiĉojn (malriĉecon, sanon, energion, loĝadon ktp), sed troviĝas ankaŭ celoj pri edukado (#4), seksa kaj socia egaleco (#5, #10), kaj paco kaj justeco (#16) — kampoj proksimaj al la tradiciaj valoroj de la esperantistoj.

Inter la celoj tamen mankas iu ajn mencio pri lingvo. Tio en si mem ne estas surprizo, ĉar en la preparlaboroj por la nova celaro, kiuj komenciĝis jam en 2012, same montriĝis konsterna nekonscio pri la lingvaj aspektoj de socia evoluo.

Mi sisteme trarigardis ĉiujn 18 “pensprezentojn” produktitajn de fakuloj tra la UN-sistemo por servi kiel koncepta bazo por la laboro pri la novaj celoj. Troviĝis en tiuj 18 dokumentoj tre diverstemaj kaj diversaŭtoraj nur kvar mencioj pri lingvoj, kaj en preskaŭ ĉiu kazo temis nur pri averto kontraŭ diskriminacio surbaze de lingva identeco. En nur unu dokumento oni aludis al la pozitiva valoro de multlingvismo por evoluigo.

Sed mi devas diri, ke ankaŭ se oni rigardas al la pli longa historio de daŭripova

evoluigo en la UN-sistemo, lingvoj ricevas tre malmultan atenton. Ekzemple en Celaro 21, dokumento produktita ĉe la granda mediprotekta konferenco en Rio-de-Janeiro en 1992, troviĝas multaj paraĝrafoj pri indiĝenaj popoloj, kiuj kompreneble formas la socian bazon de 90 procentoj de la homa lingva diverseco. Malgraŭ tiu baze pozitiva sinteno al kultura diverseco, tamen la pli vasta signifo de multlingveco por daŭripova evoluigo, kaj la grandegaj obstakloj al edukado kaj komunikado kaŭzita de lingvaj diferencoj kaj lingva diskriminacio estas neglektataj.

Kiuj estas la kaŭzoj de tiu neglekto? Parte temas pri tio, ke en Unuiĝintaj Nacioj oni ne mem tiel sentas la signifon de la lingva dimensio por ordinara homoj kaj socioj, ĉar oni mem laboras en multlingva medio kaj elturniĝas per la uzado de grandaj naciaj lingvoj, unuavice la angla.

Pli profunde, tamen, mi pensas ke kulpas la naciaj eduksistemoj, kiuj faras ĉion por doni la impreson ke unu aŭ du naciaj lingvoj sufiĉas por ĉiuj evoluigaj celoj. Tio estas bildo tre enradikiĝinta en la moderna evoluiga paradigmo, ĉar temas pri paralelaj vizioj pri tio, kio estas moderna ŝtato, kaj tio, kio estas moderna lingvo.

En tiuj vizioj, “evoluigo” estas procezo kiu direktiĝas al unueca, aŭtonoma, industria, burokrata ŝtato, funkcia racie kaj sub demokratia kontrolo; dum “lingvoplanado” estas procezo subtena al normigita, aŭtonoma, terminologie ellaborita, teknike ekipita nacia lingvo, kiu regas en la lerneja kaj politika sistemoj.

Tiu modelo estis ellaborita en okcidenta Eŭropo kaj ĝiaj kolonioj, sed nun ĝi fariĝis parto de monde influa “socia imagaro” — nia baza pensmaniero pri la funkciado de modernaj socioj.

Kiajn mesaĝojn ni portas?

Laŭ mia vido, malgraŭ la 25-jara disvolvigo de nia pensado pri “daŭripova evoluigo,” tiu klasika modelo daŭre havas multe pli da influo al la planado kaj agado de la ŝtatoj, ol diversaj alternativoj, inkluzive de la nia. Kaj la lingvopolitikaj sekvoj estas tute klaraj kaj antaŭvideblaj. Interalie, oni povas konstati en la dokumentoj de UN:

- konscion pri lingvaj problemoj nur en unuopaj kazoj (ekz. indiĝenaj lingvoj, politikaj konfliktoj, enmigrintoj);
- ĝeneralan mankon de ligo inter



lingvaj demandoj kaj aliaj sociaj streboj;

- fidon al teknologio kaj al lernado de la angla, kune kun plena manko de faka pritaksado de iliaj realaj atingoj;
- ofte, koncentriĝon al lokaj temoj kaj situacioj, evitante malfacilajn demandojn pri la nacia aŭ internacia kunteksto;

- daŭran influon de unu- aŭ dulingvismo, sub la ĝenerala devizo – “ĉiuj lernu lingvon kaj la problemoj estos solvita”.

Evidente, kiel esperantistoj, ni malfacile fidas al evoluiga strategio, kiu tiel facilanime neglektas la kernan rolon de lingvo en individua identeco kaj socia solidareco.

La demando tamen estas, ĉu tiu manko estas konstruita en la koncepto de daŭripova evoluigo? Eble jam estas klare, ke mi opinias, ke ne.

Male, la nekohera kaj supraĵa traktado de lingvaj demandoj en la evoluiga politiko de UN estas unu pruvo, ke tiu evoluiga politiko ankoraŭ ne estas vere daŭripova. Oni uzas la vorton “daŭripovo” por kamufla la obstinan volon de la ŝtatoj plui la laŭ la tradiciaj ideoj kaj celoj de iliaj elitoj.

Tio ne devus surprizi nin. Ja oni investis multe en la klasika modelo, kaj oni ne povas nei, ke ĝi alportis materian bonfarton kaj teknikan progreson al multaj homoj, kiuj tial emas kroĉiĝi al ĝi.

Evidente, la nuna disvastiĝado kaj dominado de la angla kiel internacia lingvo estas integra kaj neevitebla konsekvenco de tiu modelo, kaj la homoj kroĉiĝas al la angla precize kiel ili kroĉiĝas al siaj poŝtelefonoj kaj superbazaroj kaj aŭtoŝoseoj.

El tio sekvas, ke nia antaŭenigo de Esperanto, kiel bazo por alternativa kaj pli kohera koncepto pri daŭripova evoluigo, devas neeviteble ligiĝi kun aliaj streboj por malkroĉi la homojn de tiu fiaskanta modelo, kiu klare kondukas nin al ekologia kaj socia katastrofo.

Tio estas samtempe malbona novaĵo kaj bona novaĵo.

Malbona, ĉar tio klare montras, kian gigantan defion ni alfrontas, se ni vere deziras mondon en kiu Esperanto plene disvolvas sian potencialon.

Tra la movada historio, niaj gvidantoj ofte argumentis, ke Esperanto povas esti enkondukita simple kiel racia rimedo por pliefikigi internacian komunikadon, lasante

aliajn aspektojn de la monda socia ordo plimalpli senŝanĝaj. Evidente tio ne okazis, kaj nun ni eble pli bone komprenas kial – ĉar Esperanto postulas alian komprenon pri la socia evoluo ĝenerale, en kiu homaj identeco, komunikado kaj solidareco ludas kernan rolon.

Do, ni ne kovu iluziojn. La vizio de Zamenhof restas same radikala, kiel ĝi estis antaŭ 130 jaroj. Nur malgranda parto de la homaro estas jam sufiĉe klarvida por kompreni kaj akcepti ĝin kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj.

Sed troviĝas ankaŭ pozitiva flanko de tiu konstato. Nome, ni havas aliancinojn pli multnombrajn kaj pli diversajn, ol ni tradicie kredas. Ĉar se ni estas movado por daŭripova evoluigo en ties radikala senco, niaj streboj paralelas al tiuj de multaj organizoj kaj movadoj, kiuj pledas por radikalaĵ ŝanĝoj en la reganta evolumodelo.

Mi parolas, ekzemple, pri asocioj kaj movadoj por:

- justa traktado de enmigrintoj, kontraŭrasisma edukado, interkultura edukado, indiĝenaj rajtoj...
- internacia juro, homaj rajtoj, libereco de esprimado, libera gazetaro, popola klerigo (ekz. pri scienco)...
- naturprotektado, medikonscia edukado, ekologia agrikulturo, ŝparema vivstilo...
- ekonomia egaleco, renovigebla energio, loka produktado, justa komerco...

Kiuj estas niaj mesaĝoj por tiuj aliaj movadoj? Ke Esperanto vivas, uziĝas kaj uzindas – jes, evidente. Sed preter tio, ni portas mesaĝojn pri la graveco de lingvoj kaj lingva diverseco por daŭripova evoluigo. Skize, mi resumas tiujn mesaĝojn jene:

- Daŭripova mondo estas multlingva mondo (ni estas movado por justa kaj sekura multlingveco)
 - Daŭripova mondo estas interparolanta mondo (ni estas movado por egaleca kaj efika komunikado)
 - Daŭripova mondo estas interkultura mondo (ni estas movado por kultura diverseco kaj tutmondeca edukado)
- Tiuj principoj, laŭ mi, estas fundamentaj por la esperantista koncepto pri daŭripova mondo. Tiuj estas la principoj, kiujn ni provas realigi en niaj propraj rondoj, kaj kiuj motivas

nian kunlaboron kun aliaj organizoj. Sed mi demandas min: kiel sukcesaj ni estas en la komunikado de tiuj principoj al la homoj, kiuj ne parolas Esperanton? Ekzemple, se vi pensas pri via propra landa asocio aŭ loka klubo, ĉu viaj retejoj kaj informiloj evidentigas, ke nia movado:

- estas multlingva kaj aprezas multlingvecon?
- subtenas komunikadon pri ĉiaj temoj, i.a. per tre diversaj retejoj, revuoj, renkontiĝoj?
- edukas homojn al interkultura kompreno kaj tutmondeca perspektivo?

La nepoj nin benos

Homoj venas al Esperanto pro plej diversaj kialoj, kaj kunportas siajn proprajn kredojn kaj antaŭjuĝojn, siajn esperojn kaj iluziojn. Ne povas esti alie.

Ĝuste pro tiu denaska diverseco de la esperantistaro, ni bezonas klaran koncepton pri la karaktero de nia movado, koncepton sufiĉe aktualan kaj malfermitan ke ĝi restas en dialogo kun la socioj ĉirkaŭ ni. Tia koncepto povas doni al ni direkton por la propra evoluo, responde al la bezonoj kaj ebloj de ĉiu epoko, kaj helpi eviti la riskon de sencela drivado.

Por ni, la esperantistoj de la 21-a jarcento, daŭripova evoluigo povus fariĝi tia koncepto. Ne en la formo, en kiu la naciaj registaroj uzas ĝin, sed en la formo de alvoko, pensi kaj agi radikale kaj responde en siaj vivelektoj, en sia konduto kiel familiano kaj civitano kaj homarano.

Konscie viciĝante inter la movadoj por daŭripova evoluigo, ni povos trovi novan sencon en nia esperantisteco kaj novajn direktojn kaj celojn por nia agado, loke, lande kaj internacie.

Ĉar la kerna devizo de daŭripovo estas la fama aforismo de Wendell Berry, ke ni ne heredas la mondon de niaj prapatroj, sed prunteprenas ĝin de niaj idoj; kaj ĝuste tiu sento de respondeco al la venontaj generacioj estas forta motivo kaj inspiro, ankaŭ por ni esperantistoj.

Kiel dirus Zamenhof, se ni plene akceptos tiun respondecon kaj agos laŭ ĝi, la nepoj nin benos.

Verkita kiel parolado por la inaŭguro de la 82-a Itala Kongreso, San Benedetto, 22-29/aŭg./2015



Celoj por Daŭripova Evoluigo dum la periodo 2015-2030

1 Forigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj.



2 Forigi malsaton, atingi manĝo-sekurecon kaj pli bonan nutradon, kaj antaŭenigi daŭripovan agrikulturon.



3 Garantii sanajn vivojn kaj kreskigi bonfarton por ĉiuj homoj en ĉiuj aĝoj.



4 Garantii inkluzivan kaj egalecan, bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado.



5 Atingi egalecon inter la seksoj kaj plivastigi la decidopovon de ĉiuj virinoj kaj junulinoj.



6 Garantii al ĉiuj homoj haveblon kaj daŭripovan mastrumadon de akvo kaj sanitariaj sistemoj.



7 Garantii al ĉiuj homoj alireblon al pagebla, fidinda, daŭripova kaj moderna energio.



8 Antaŭenigi daŭran, inkluzivan kaj daŭripovan ekonomian kreskon, plenan kaj produktivan dungitecon kaj bonkondiĉan laboron por ĉiuj homoj.



9 Konstrui elteneman infrastrukturon, akceli inkluzivan kaj daŭripovan industriigon kaj kultivi inventemon.



10 Redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj.



11 Igi urbojn kaj homajn loĝejarojn inkluzivaj, sekuraj, eltenemaj kaj daŭripovaj.



12 Garantii daŭripovajn formojn de konsumado kaj produktado.



13 Urĝe agi por kontraŭbatali klimatsanĝigon kaj ĝiajn efikojn (konforme al la Kadra Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatsanĝigo).



14 Konservi kaj daŭripove utiligi la oceanojn, marojn kaj marajn resursojn cele al daŭripova evoluigo.



15 Protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastriumi arbarojn, kontraŭbatali dezertiigon, haltigi kaj inversigi la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdisigon de biodiverseco.



16 Antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭripova evoluigo, garantii aliron al justico por ĉiuj homoj, kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn sur ĉiuj niveloj.



17 Plifortigi la realigajn kapablojn kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo.



Premio Deguĉi 2015 al Éva Farkas-Tatár

■ **Zsófia Kóródy**

La Premio Onisaburo Deguĉi estis starigita per donaco de Oomoto en 1987 kaj estas aljuĝata ĉiujare. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj.

Laŭ sia regularo la Premio Deguĉi estas asignata "pro meritoj en la utiligo de Esperanto kiel rimedo por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la ideo de L.

L. Zamenhof kaj al instruoj de Onisaburo Deguĉi, kaj pro kontribuo al la celo de UEA kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por aliaj popoloj".

La Estraro de UEA aljuĝis la ĉi-jaran premion al Éva Farkas-Tatár el Hungario. La decido estis anoncita en la Fermo de la

100-a UK en Lillo.

Éva Farkas-Tatár naskiĝis en 1924 kaj lernis Esperanton en 1961. En 1962 ŝi partoprenis UK en Kopenhago, kiu tiom ravis ŝin, ke ŝi decidis dediĉi sin al la instruado de Esperanto. Por perfektigi ŝi iris al la UK en Hago en 1964, kie ŝi sekvis lecionojn de Andreo Cseh. Tiel komenciĝis 50-jara instrua agado per la Cseh-metodo en multaj landoj kaj plej diversaj renkontiĝoj. Ŝi revenigis la Cseh-metodon al ĝia kerno: la gaja, luda maniero, dank' al kiu la lernantoj tuj ekparolas Esperante. Tiun arton ŝi transdonis al multaj novaj instruantoj, kiujn ŝi trejnigis per Cseh-seminarioj, i.a. en UK-oj.

UEA invitas prelegi en la IKU-sesio en Nitro

Kadre de la 101-a UK en Nitro okazos la 69-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-7179901 Modiin, Israelo; rete: amri@huji.ac.il.

La proponoj alvenu plej laste la 31-an de januaro 2016.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistas el la prelego kadre de IKU kaj el du kromaj prelegoj. Oni bonvolu indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelego estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Aparte bonvenaj estos prelegoj kun rilato al la

kongresa temo "Socia justeco – lingva justeco", sed bonvenos ankaŭ proponoj pri aliaj temoj. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝo. Proponoj kiuj ne estos elektitaj por IKU, povos tamen esti utiligitaj en aliaj kadroj.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano de la 101-a UK kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Akceptita prelego estos rekompencita per honorario de 260 EUR. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas ĉe uea.org/dokumentoj/IKU.

Oficiala Informilo

■ DUMVIVAJ MEMBROJ

Belgio: M. Cédric.

■ DONACOJ

Ĝis la 10-a de oktobro

FONDAĴO AMERIKO

Britio: M. Sims 95,68.

Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00.

Sumo ĉi-jara: 452,41.

KONTO ARABIO

Francio: M. Abada-Simon 10,00.

Sumo ĉi-jara: 447,62.

KONTO AFRIKO

Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00; A.

Schouten-Buys 20,00.

Svedio: J. Hammarberg 21,32.

Usono: M. Kennedy 194,85.

Sumo ĉi-jara: 3847,75.

FONDAĴO AZIO

Japanio: Aikawa S. 29,35; Huzita T. 22,02; Isino

M., Koyama T., Sanpei K., Syōzi N., Unoki T.,

Yazaki Y. - po 14,67; Syōzi K. 58,69.

Sumo ĉi-jara: 2050,40.

FONDAĴO CANUTO

Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00; R.

Schmeits, Anonima – po 5,00.

Rusio: A. Grigorjevskij 15,00.

Sumo ĉi-jara: 4857,70.

KONTO ESPERO

Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00.

Sumo ĉi-jara: 7343,36.

JUNULARO

Italio: R. Clerici 100,00.

Sumo ĉi-jara: 491,50.

TRIAMONDA KONGRESA

Div. malgrandaj: 2,40.

Sumo ĉi-jara: 6482,50.

VOLONTULA FONDAĴO

Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00.

Sumo ĉi-jara: 3728,00.

ĜENERALA KASO

Nederlando: F.D. van Zoest 20,00.

Div. malgrandaj: 2,00.

Sumo ĉi-jara: 1440,40.

**Al ĉiuj UEA
kore dankas!**



Junigi la komunumon: temo por AMO, defio por ĉiuj

■ Stefan MacGill

La estrara laborplano 2015-2016 antaŭvidas la ellaboron kaj ekrealigon de komuna varbstrategio de UEA kaj TEJO, pro la urĝa bezono por pli ekvilibra aĝostrukturo por la asocia membraro, kiun oni ne traktis tra lastaj jaroj kun la necesa urĝo. Nun programo de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO) alprenas la defion kaj dediĉos tutan seminarion al la temo, kiun ni malfermas por ĝenerala diskuto antaŭ, dum kaj post la seminario.

En la diskutlisto "uea-membroj" umis iom esotera debato pri la aĝlimo por "juneco". Rigardante la statistikon pri la demografio de la membraro de UEA, ni konsternite konstatas, ke por nia asocio iu ajn sub 50-jaraĝo estas taksata "junulo". Feliĉe, la situacio por la E-komunumo entute estas malpli akuta, sed ne tiom. Malfacilas taksati la aĝostrukturon de la esperantistoj entute; klare regionoj ekster Eŭropo alportas al ni pli ekvilibrantan situacion.

Iuj argumentas kaj aktive laboras tiucele, ke nia optimuma celgrupo por varbado estu la tiel nomata "Tria Aĝo". Ilia agado tre valoras; la argumento havas meriton. Tiuj homoj ekde la pensiigo havas pli da libera tempo, akumulis grandan maturecon, kontaktojn, sperton kaj multe da kono (kiuj gvidas ofte al saĝo), kune kun foje mirinda fonto de energio. Nia movado ne povus funkcii sen ili. Tamen, post analizado, necesas konkludi, ke la aĝostrukturo de la asocio estas multe tro malekvilibrata kaj necesas pli forte varbi inter ĉiuj aĝgrupoj kaj igi nian asocion pli alloga por homoj de ĉiuj aĝoj.

Analizo de la situacio

Jen malkutima "Jar"-raporto! La unua analizo rilatas al ĉiuj individuaj membroj de UEA kies aĝo estas konata. Ĝi prezentas datumojn por 2015 ĝis la fino de septembro kompare kun la jara finsumo por la tuta jaro 2000 – la unua por kiu ciferoj estis komputile alireblaj. En 2015 UEA havas 5426 membrojn, el kiuj 9% kun nekonata aĝo. En 2000 ni havis 6555 membrojn, el kiuj 14% kun nekonata aĝo.

La "Tabelo unu" montras la datumojn por diversaj aĝgrupoj, la dekstra kolumno montras la procentan diferencon, la sago montras, ĉu temas pri kresko aŭ falo. La "Grafikaĵo unu" prezentas la samajn

datumojn en pli digestebla formo, el kio tuj vidiĝas, ke inter 2000 kaj 2015 la membraro signife pliaĝiĝis. En 2000 la averaĝa aĝo de UEA-membro estis 53; en 2015 tio altiĝis ĝis 60. La mediana aĝo kreskis de 54 ĝis 63. Do, en periodo de 15 jaroj la averaĝo altiĝis je 7 jaroj kaj la mediano je 9. El tio oni tiru konkludojn. Frazo sendita de la matematikisto François Lo Jacomo resumas nian situacion pri 2015 koncize kaj frappe:

Nur 8% estas malpli ol 30-jaraj kaj 25% malpli ol 50-jaraj, dum 25% estas pli ol 73-jaraj kaj 8% pli ol 82-jaraj.

30-jareco estas ja la limo por membreco en TEJO. Resume, demografo rigardante tiujn profilojn rapide konkludus, ke temas pri asocio aktive perdanta sian kapablon pluvivigi sin.

La dua analizo komparas – laŭ ĝisdatigitaj datumoj de Unuiĝintaj Nacioj – nian membraron en 2015 kun tiu de la tuta mondo en 2010-13. Ja estus absurde deziri, ke la membraro de UEA sekvu tiun mondan normon. Ĝenerale la landoj kun pli junaj populacioj estas en mondpartoj, kie UEA ne sukcesis ĝis nun funde penetri, aŭ kie limigita pagipovo bremsas pli vastan membriĝon. Bonŝance, ni ekvidas kreskojn en kelkaj landoj, kie pli junas la esperantistoj, unuavice Koreio kaj Ĉinio. Ni laboru por ke tiuj kondiĉoj ripetiĝu en pliaj landoj, rezulte de celtrafa laboro de UEA, kun samtempaj tutmondigo kaj junigo de ĝia membraro.


La "Tabelo du" montras ciferojn pri la monda popolo laŭkontinente, kun monda komparo inter UEA kaj tiu tutgloba popolo, kiun ni volus alparoli. La fonto pri la mondo estas de Unuiĝintaj Nacioj kun datumoj el 2013. Pri UEA temas denove pri la suma membraro en ĉiuj kategorioj, sed nur tiuj, kies naskiĝdato estas konataj.

La "Grafikaĵo du" montras similajn datumojn, sed por havi kompareblajn ciferojn en dekjaraj aĝblokoj, necesis uzi alian fonton por la mondo: la datumoj venis de <http://www.gapminder.org/population/tool/> kaj datiĝas el 2010, sed la origina fonto estis de UN.

La aĝostrukturo de la membraro de UEA en 2015 kaj 2000

N-ro 2015	Proc. 2015	Aĝoj (jaroj)	N-ro 2000	Proc. 2000	▲ ▼	Diferenco 2015-2000
4	(0.07 %)	1 – 10	27	(0.41 %)	▼	n/a
75	(1.38 %)	11 – 20	135	(2.06 %)	▼	44 %
349	(6.44 %)	21 – 30	556	(8.48 %)	▼	37 %
357	(6.59 %)	31 – 40	706	(10.77 %)	▼	49 %
532	(9.81 %)	41 – 50	858	(13.09 %)	▼	38 %
884	(16.31 %)	51 – 60	1053	(16.06 %)	▼	16 %
1147	(21.16 %)	61 – 70	1027	(15.67 %)	▲	12 %
1008	(18.59 %)	71 – 80	776	(11.84 %)	▲	30 %
470	(8.67 %)	81 – 90	235	(3.59 %)	▲	100 %
99	(1.76 %)	91 kaj pli	28	(0.43 %)	▲	239 %
4925			5401			

Aĝ-distribuo: membroj de UEA en 2000 kaj 2015



Survoje al solvoj

Ĉu eblos baldaŭ ekstrakti la temon? La respondo estas JES! Tio signas ne nur pozitivecon, sed la renkontiĝon Junulara Esperanto-Semajno (JES), komunan aranĝon inter la pola kaj germana junularoj, kiu tamen kunlabore kun HEJ okazos en Hungario jarfine en 2015. La vinfama urbo Eger rande de la nordorientaj montoj de Hungario bonvenigos internacian junularon – la lasta JES havis ĉirkaŭ 150 partoprenantojn.

La tri organizoj (GEJ, PEJ, HEJ) konsentis bonvenigi ankaŭ AMO-seminaron, la 17-an. Ĝia temo: “Junigi la komunumon”. Ĝi okazos tra kvar matenoj, inter la 28-a kaj 31-a de decembro. Ni celas venigi per stipendioj junulojn kaj junulargvidantojn el la landoj de la Sud-Orienta Regiono de Eŭropo (SORE), kie la demando estas tre aktuala, ankaŭ sur la landa nivelo. La nuna artikolo rolos kiel prepardokumento por tiu seminario, en kiu ni diskutos la sekvajn temojn.

Ses diskutotemoj

1. Membrovarbado

UEA evoluigu komunan strategion kun TEJO pri membrovarbado inter homoj en la aĝo de TEJO kaj en la “juna” kategorio por UEA (t.e. inter 30 kaj 50). Tio staras en la estrara laborplano 2015-2016, sed proponoj kaj ideoj de ĉiu estas bonvenaj. En pluraj landoj la komunumo havas ekvilibran aĝostrukturon, en kelkaj el ili la membraro en UEA laŭdinde kreskas. Indas direkti nian varban atenton al tiuj landoj.

2. Membrotransigo de TEJO al UEA

Kiel transformi la agadon kaj percepton de UEA, ke ĝi estu pli alloga al la anoj de TEJO atingantaj ĝian limaĝon. Bonvena estos enketo, kiom el la TEJO-membroj ja konservas sian membrecon en UEA. Per kiuj mesaĝoj kaj rimedoj UEA provu varbi tiujn TEJO-anojn kiuj fariĝis 31-jaraj? Kiun pli allogivan sistemon ni uzu, ol la simpla memorigo, ke nun ili havas la aĝon por aliĝi rekte al UEA? Tio postulos pli proksiman kunlaboron inter TEJO kaj UEA.

3. Allogi aktivulojn el TEJO

Gravas, ke UEA riĉigu sian aktivularon. TEJO kapable trejnas aktivulojn, sed ili laŭdifine povas tie aĝi nur tra malmultaj jaroj. Post la TEJO-aĝo ili plejparte malaperas; UEA perdas valoran fonton da kapablo ĝuste en la aktualaj kampoj, kiujn ĝi urĝe bezonas. UEA kaj TEJO devas proponi konkretajn manierojn por teni ilian aktivadon en UEA, komprenante, ke en tiu vivo-parto la tempo kaj energio

dediĉebla al Esperanto havas klarajn limojn. Necesas specife krei kaj anonci utilajn taskojn, kiuj estas plenumblaj per kelkhora sindediĉo semajne.

4. Refortigi la landan agadon de TEJO

Ni tiru konkludojn el la delonge farata reta raportado de la TEJO-sekcioj por formuli revivigajn planojn por dormantaj sekcioj; foje indos krei planon por grupoj da landoj kun simila stato – ĝuste tiel estas en la regiono SORE. Aldone al la refortigo de landaj sekcioj de TEJO, UEA kaj ĝia junulara sekcio kune devas ellabori strategion kiel pli praktike reagi al helpopetoj el landoj aŭ regionoj kun demografiaj defioj. Ekzemplo estos helpo al iuj landoj starigi retejon por modernigi la komunikadon inter membroj kaj nacilingve informi la publikon pri la lingvo, ĝiaj ebloj kaj la agado de la asocio.

5. Ekkoni kaj kapti retajn kursfinintojn

Ellabori manierojn ekscii pri retkursaj finintoj ĉe retejoj kiel *Duolingo*, *uTalk*, *lernu.net* aŭ instruistoj ĉe *edukado.net* por inviti ilin al konvenaj ĉeestaj renkontiĝoj. Necesas kompreni iliajn sintenojn, vivmanieron kaj idearon, kun la celo krei por ili allogajn renkontiĝojn – inviti ilin al tradiciaj nekonvenaj renkontiĝoj povus krei la malan reagon ol ni esperas. Unuavice tiuj studantoj bezonos parolpraktikon.

6. Konigi regionajn eventojn rete

Se ne eblas akiri retadresojn el retkursoj, la inversa aliro utili: peti E-retejojn kiel tiuj de UEA, TEJO, *Lernu.net* kaj *edukado.net*, konigi konvenajn aranĝojn en la landoj kun bezono, por fortigi la eblojn de ret-esperantistoj starigi kontaktojn kun niaj komunumaj esperantistoj.

Demandoj specifaj al AMO 17

1. Ekkoni la situaciojn

Unutage ni aŭdos raportojn kaj taksojn pri la ebloj kaj obstakloj de la unuopaj landoj de SORE. Ni invitos reprezentantojn de landoj de Centra Eŭropo, kie bone funkcias landaj sekcioj de TEJO

(Hungario, Pollando, Slovakio) aŭ kie floras junulara agado (Ukrainio kaj en SES).

2. Krei solvojn kaj projektojn

Post diskutado de la ses supraj temoj, la seminarianoj verkos fine rekomendojn kaj cerboŝtorme provos proponi projektojn. Ekzemple, sondi pri eblo sendi etan TEJO-teamon al iuj landoj de la regiono SORE kune kun utila materialo por okazigi kun lokaj agantoj kunvenojn por ĉefe juna publiko. Kaj espereble alsurfaciĝos svarmo da pliaj kreivaj ideoj.

Celoj kaj Konkludoj

Nia Strategia Vizio el 2012 pledas por konkretaj celoj, laŭ principo SMART. Mi proponos celojn, kiuj estas Specifaj, Mezureblaj, Realaj kaj Trafaj. Pri “Atingeblaj” eblas demandsigni. Jen la celoj:


Ene de kvin jaroj aŭ la averaĝa aŭ la mediana aĝo de la asocia membraro falu sub 55-jara kaj ene de dek jaroj sub 50.

Ni levas la temon por vasta debatado, por pliaj esploroj kaj proponoj ene de AMO-seminario 17. Certe tio ne estos la lasta seminario kiu traktos la temon. Krome UEA kaj TEJO pretigos komunan varbstrategion. Do, la defio estas rekonata kaj traktata. Ankaŭ vi kontribuu al la realigo de tiu celo!

Aĝdistribuo laŭ kontinentoj kaj monde, kompare kun la membraro de UEA

Regiono	0-14	15-44	45-64	65+
Afriko	39.8 %	45.2 %	11.4 %	3.6 %
Ameriko	24.1 %	44.5 %	21.5 %	9.8 %
Azio	25.0 %	47.9 %	20.1 %	7.1 %
Eŭropo	15.6 %	40.3 %	27.3 %	16.8 %
Oceanio	23.8 %	43.0 %	21.9 %	11.3 %
Mondo	26.1 %	46.2 %	19.7 %	7.9 %
UEA-membraro	0.36 %	20.0 %	35.6 %	44.0 %

Membraro UEA 2015 kaj monda loĝantaro



La dolĉa vivo itala

■ Yves Nevelsteen

Ĉi-somere mi kaj mia kunulino Eveline elektis Italion kiel ferilandon: San Benedetto del Tronto, verda oazo kun 8000 palmoj, sabla strando, amuzejoj, modbutikoj, reviga kuirarto, plaĉa distro por plenkreskuloj kaj infanoj, sportejoj, romantika landinterno, kulturaj eventoj, promen- kaj biciklovojo, nuntempa arto kaj historiaj tradicioj. Ĉio tio laŭ la kongreslibro kaj de mi konfirmita. Nia ideo estis kombini Esperanton kun la itala lingvo, precipe ĉar mia kunulino tiun lingvon studis kaj ŝi pri Esperanto estas komencanto. Kvankam ni devis iom serĉi por trovi de Belgio malmultekostan manieron atingi la adriatikan marbordon, evidentiĝis esti bona elekto. La teruran varmon kiun ni antaŭvidis dum aŭgusto en Italio estis sufiĉe eltenebla. Klimatiziloj bone funkciis en nia apartamento samkiel en la plej multaj kongresejaj salonoj.

Loĝado

Ni loĝis en apartamento proksime de la kongresejo kaj de la centro de la urbo. Dum la unuaj tri tagoj ĉe ni loĝis usonano. Estis agrabla persono kaj interesa sperto dividi vivĉambron kaj kuirejon kun li, sed ni tamen ĝojis poste esti solaj. Plej grava ĉiukaze estis la bona retaliro en la apartamento. Ni estis tre kontentaj loĝi je piedira distanco de la kongresejo. Dank' al tio ni malkovris plurajn neatenditajn eventojn en la urbocentro. Ne ĉiuj kongresanoj loĝis en la urbocentro; kelkaj el ili devis veturi per buso.

Ni aliĝis kiel memzorgantoj, ĉar mi preferas manĝi senglutene. En la lando de pasto kaj pico ni antaŭvidis malfacilaĵojn. Sed ne! En San Benedetto ni facile trovis produktojn de Schär kaj eĉ vendejon kiu vendis nur senglutenajn. Unufoje mi eĉ manĝis senglutenan glaciaĵon.

La kongresejo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo

Esperanto estis tre videbla en San Benedetto. Ĝojigis min vidi plurajn grandajn afiŝojn apud la kongresejo meze de la urbo, kie pasis ĉiutage miloj da homoj. Ankaŭ okazis ekspozicio pri Esperanto en loka kultura centro kaj la renkontiĝo aperis en broŝureto pri lokaj someraj okazaĵoj.

La kongreslibro kaj seminarioj

Klare la kongreso estis profesie organizita. Ni ricevis bele enpaĝigitan kongreslibron, en kiu oni interalie menciis ke la kongreso okazos sub aŭspicio de la Regiono Marke kaj de la provinco Askoli-Piĉeno. La listo de partoprenantoj imponis: 250 homoj el pli ol 30 landoj! La ĉefa temo de la kongreso estis 'Kultura tutmondiĝo: limoj kaj perspektivoj'. Mark Fettes, prezidanto de UEA, persone gvidis seminarion pri tio. Okazis du aliaj seminarioj pri E-literaturo kaj pri sorobano. Eveline kaj mi aktive partoprenis la seminarion pri sorobano. Estis impone lerni pri tiu abako japana rekte de japanino. Por Eveline estis bona ekzerco lerni pri kalkulado en Esperanto; malfacile sed interese. Kimie Markarian feliĉe parolis klare kaj malrapide; kaj ŝi bonege regas la temon.

E-kursoj kaj prelegoj

Matene okazis E-kursoj en tri niveloj. Por internaciigi la kongreson, ĉiujn kursojn gvidis neitaloj: la bulgarino Mariana Genĉeva, polino Nina Pietuchovksa kaj hispano (kiu momente loĝas en Siberio!) Rafael Matéos. Estis tre saĝa elekto de la organizantoj! Tradicie dum italaj renkontiĝoj homoj ofte parolas la italan; ni spertis, ke funkcias la plano de la organizantoj ĝin pli "malitallingvigi". Pluraj anoncoj estis faritaj dulingve, sed konklude regis vere internacia etoso.

Davide Astori de la universitato de Parma donis plurfoje prezenton pri Esperanto en la itala. Ne venis multaj interesatoj; estas malfacile en Italio (kaj sendube ne nur tie) zorgi pri tio, ke la loka gazetaro informu pri Esperanto.

Ekskursoj kaj vespera programo

Okazis pluraj ekskursoj. Ni ne partoprenis ĉiujn, interalie ĉar ili estis iom multekostaj, sed ankaŭ ĉar ni preferis kelkfoje private ekskursi. Ĉio pasis glate dum nia dumjarda ekskurso al Castelfidardo kaj la grotoj de Frasassi. En la buso akompanantoj rakontis en klare komprenebla Esperanto pri la ekskursceloj

kaj la regiono.

La vespera programo okazis en Palazzina Azzura, prezentejo en publike alirebla parko. Profesiaj kantistoj bele kantis en Esperanto kaj la itala. Al ni mankis nur, ke neniu dancis; ĉiu sidis sur seĝo kaj aŭskultis. Ĝenerale la programo estis iom tro "pasiva" por ni. Mankis sesioj pri komuna kantado, pentrado (aŭ io simile krea), jogo, komuna trinkejo kun ludoj kiel ŝako kaj kartoludoj. Sed la programo estis tamen sufiĉe riĉa; Kim Henriksen kaj Michela ekzemple gvidis instruadon de tango-dancado.

Kelkaj interesaĵoj

Ni rimarkis kelkajn interesaĵojn en Italio. Iom ŝokis nin ke la vespera programo porinfana en la urbo ofte ekas nur je la 21h. En Belgio infanoj ĝis la aĝo de 10 tiam estas en la lito. Ni devis al kutimiĝi ankaŭ al la horaroj de vendejoj ktp. Inter la 13h kaj 17h estas tre malmulte da aktiveco; efektive vere tro varmis por fari ion ajn krom siesti. En la turisma oficejo ni senpage (vi bone legas) prunteprenis biciklojn.

Blinduloj kunkongresis

La estraro de Itala Esperanto-Federacio invitis Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj kune kongresi en San Benedetto. Malgraŭ kelkaj evidentaj komplikoj, Eveline kaj mi multe aprezis tion. Ne ĉiutage eblas sperti kiel vivas blinduloj kaj kiel iliaj akompanantoj agas. Mi unuafoje vidis programlibron de Esperantorenkontiĝo en brajlo. Tre impona!

Konkludo

Tre plaĉis al Eveline kaj mi la kongreso, eĉ se la averaĝa aĝo de la kongresanoj multe superis nian. Se vi neniam vizitis Italion kaj ŝatas tradiciajn renkontiĝojn, la itala kongreso estas bona okazo. Partoprenis multaj famaj esperantistoj kiel Roman Dobrzyński kaj la estraranoj de Bona Espero Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia. Venontjare ĝi okazos en Frascati, proksime de Romo. Mi rekomendas!

Kial tiom gravas eksteraj rilatoj por ni?

■ Michael Boris Mandirola

Mi eklernis Esperanton antaŭ deko da jaroj, kaj ekde novembro 2009 mi aktivas, interalie, en la fako de eksteraj rilatoj en TEJO.

Kiel diris iama prezidanto de UEA, "Zamenhof kreis Esperanton por ŝanĝi la mondon, ne por vojaĝi tra ĝi per Pasporta Servo", kaj mi ja kredas ke pro idealo multaj el ni lernis Esperanton kaj trovis sian motivon agadi. La mondo havas lingvan problemon kaj ni havas la plej justan kaj efikan solvon al tiu problemo; nia tasko kiel esperantistoj estas konsciigi onin pri la lingva problemoj kaj proponi nian solvon.

Tamen ne sufiĉas tion diri inter ni, ni devas tion taŭge komprenigi al la neesperantistoj kaj aparte al la homoj, kiuj agadas por socia ŝanĝo, kaj al tiuj, kiuj estas aŭ estos en la decidaj tavoloj. Tial gravas eksteraj rilatoj por ni kaj ankaŭ por trovi "kunvojaĝantojn" en aliaj sociaj movadoj, kies celoj estas plibonigo kaj plijustigo de la mondo, kaj kun kiuj ni povas labori por mondo pli justa kun Esperanto en la komuna celaro.

Sennomulo skribis en iu Esperanta gazeto, ke TEJO iĝos superflua kaj en la nova reta epoko li povus parte pravi. TEJO iniciatis kaj kunordigas fierindajn agadojn, sed nuntempe multaj projektoj naskiĝas spontanee en nia komunumo sen organiza subteno, kiel Muzaiko, kaj aliajn povus realigi niaj landaj sekcioj sen la neceso de iu centra kunordigo. Tiu sennomulo tamen klare ne komprenas, ke ĝuste pro sia laboro sur la kampo de eksteraj rilatoj TEJO ne povas

iĝi superflua. Formala organizo estas nepre postulo por partopreni plene internaciajn junularajn forumojn. Ĉu vi povas imagi, ke entuziasma esperantisto aperu de nenio en pinta internacia renkontiĝo de junularaj organizoj kaj komencu paroli pri Esperanto al la gvidantoj de aliaj tutmondaj organizoj? Se jes, via imago mistrafas la realon.

Necesas konstanta laboro dum pluraj jaroj, kun regula partopreno en eventoj (kiam eble, plurope), de retaj kunsidoj kaj verkado de skribaj retkontribuoj por konstrui bildon pri organizo serioza, kapabla, fidinda kaj inda je kunlaboro. Nun TEJO estas perceptata en la junulara civitana sociaro (eŭroprivele, sed ĉiam pli tutmonde) kiel ia "gardhundo" de lingvaj rajtoj kaj lingva justeco. Tio estas gravega rolo, kaj ni povas konstati nian efikon per la ĉiam pli ofta mencio de lingvoj, kiam oni parolas pri rajtoj kaj diskriminacioj. Ĉiam pli da internacie aktivaj gejunuloj (inter kiuj kelkaj estas politikistoj kaj aliaj certe estonte estos) scias, kio estas Esperanto, ke ĝi vivas, ke estas junulara Esperanto-organizo tre aktiva kaj engaĝita, kiu kapablas kompetente kontribui al la komunaj laboroj pri lingvaj temoj kaj ne nur. Kelkaj eĉ eklernis Esperanton.

Danke al laboro de multaj homoj, kaj al la donacoj de malavaraĵ samideanoj, ni povas fieri pri niaj atingoj.

Kompreneble asocio ne povas konsisti simple el eksteraj rilatoj, ja oni ne povas reprezenti nenion, sed sukcesaj eksteraj rilatoj pozitive efikas sur aliaj kampoj, se



paroli nur pri ĉi-jaraj ekzemploj:

- La sukceso en niaj subvencipetoj ŝuldiĝas ankaŭ al la informoj, kiujn ni akiris ekster nia movado (ekz. administra subvencio 2015);
- Survoje al niaj eventoj niaj reprezentantoj foje landagadumis (ekz. vizito de Łukasz Żebrowski al Burundo);
- Ni krome sukcesis ekhavi valorajn trejnadojn dum niaj eventoj (ekz. trejnado de Eliza Popper dum IJF 2015).

Iu nomis la anojn de TEJO-KER turistoj, kaj efektive ni multe vojaĝas, tamen tiu difino ne taŭgas. Pri pluraj Eŭropaj urboj mi vidis nur flughavenon kaj kongresejon, ja dum la eventoj ni tuttempe kunsidas, verkas, lobiumas aŭ simple flankbabilas pri nia afero al neesperantistoj en neformala etoso – tamen estas mirinda sperto. Estas tre fierige reprezenti TEJO-n; ni foje sidas inter gigantoj kun milionoj da membroj, dekoj da homoj en la stabo, kaj ni rimarkas, kiom relative multe ni sukcesas fari danke al la entuziasmo kaj la motiviĝo de niaj aktivuloj inspiritaj de granda idealo kaj mirinda komunumo. Ni bezonas renovigi la kondiĉojn, en kiuj ni povu tion fari – ni ankoraŭ havas ion gravan por diri al la mondo.

UEA

Subvencio

Helpo de Biblioteka Apogo Bachrich al ok bibliotekoj

La fondaĵo "Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich", kiun UEA starigis pasintjare per donaco de la gefiloj de ges-roj Bachrich, disdonis 1 500 eŭrojn kiel siajn ĉi-jarajn subvenciojn.

La fondaĵo asignis subvenciojn al 8 el 11 petintoj. La Libroservo de UEA ekspedis al la sukcesintoj librojn laŭ iliaj dezirlistoj.

Subvencion ricevis Biblioteko Carlos Domingues de Brazilo E-Ligo (€ 180),

Bulgara E-Asocio (€ 191), E-biblioteko en Rumonge (Burundo; € 377), Biblioteko de Ĉeĥa E-Asocio en Svitavy (€ 133), Filipina E-Junularo (€ 157), Dokumenta E-Centro (Kroatio; € 145), E-o Nicaragua (€ 158) kaj Biblioteko de "La Ondo de E-o" (Rusio; € 156).

La Biblioteka Apogo Bachrich daŭrigas la tradicion de la iama Biblioteka Apogo Thorsen, kiu subtenis E-bibliotekojn ekde 1997 ĝis 2011.

Kampanjo “AMU Poznanon”... Relanĉita!

■ **Jenja Amis**

En 2014 ESF lanĉis la kampanjon “AMU Poznanon”, laŭ kiu la fondaĵo duobligis la donacojn de esperantistoj por stipendioj al gestudentoj de la Interlingvistikaj Studoj de Adam Mickiewicz-Universitato (AMU) en Poznano. La kampanjo daŭras ankaŭ por la studjaro 2015-2016! Ni elkore dankas ĉiujn, kiuj jam “amis Poznanon”, kaj denove invitas esperantistojn al partopreno!

Rekordoj

La pasintan septembron grupo el 26 talentaj, entuziasmaj kaj laboremaj homoj el 14 landoj venis al Pollando por komenci sian unuan jaron de la stud-programo pri interlingvistiko kaj esperantologio en AMU, la tria plej granda universitato de Pollando. Temas pri rekorda grupo ekde la komenco de la programo en 1998! Kelkaj studentoj veturis milojn da kilometroj ĝis Pollando por komenci en 2015 sian duan jaron de la studoj, sed nek la grandaj distancoj, nek la malvarmeco de la polaj vintroj, nek financaj malfacilaĵoj forprenas la entuziasmon de la gestudentoj: ili sentas sin privilegiitaj studi en Poznano kaj estas dankemaj al ĉiuj, kiuj ebligis ilian partoprenon en la programo: al la gvidantino de la studoj, Ilona Koutny, al Edukado.net kaj Katalin Kováts, al kelkaj landaj asocioj, kiuj trovis iom da mono en sia buĝeto por financi partoprenon de sia(j) membro(j), al ESF, kiu ebligis la stipendiojn kaj, kompreneble, al ĉiu individuo, kiu donacis monon al la programo “AMU Poznanon”, kiun ESF lanĉis pasintjare.

Dum tiu ekscita postdiploma trijara programo la studentoj venos al Poznano entute sesfoje (dufoje ĉiujare) por intensaj sesioj, faros nekalkuleblajn taskojn, alfrontos ekzamenojn, kreas la reton de kontaktoj kaj amikoj, kaj la sepa fojo estos jam la fina ekzameno kun defendo de la diplomlaboraĵo. Ili enprofundiĝos

en Esperantajn fonetikon, gramatikon, kulturon kaj literaturon, ili estos incitaj en la misterojn de interlingvistiko, komunikado, semantiko kaj leksikologio kaj lernos pri pluraj aliaj ekscitaj temoj de niaj plej elstaraj specialistoj (Humphrey Tonkin, Sabine Fiedler, István Ertl, Vera Barandovská-Frank, Ilona Koutny, Zbigniew Galor, por nomi nur kelkajn). Post la fino de la studoj ili mem instruos, laboros, esploros kaj portos la prestiĝon kaj profesion nivelon de Esperanto al pli alta ŝtupo! Komence de la nova sesio ni intervjuis kelkajn el ĝiaj partoprenantoj: Rafael Henrique Zerbetto, Karina Oliveira (ambaŭ el Brazilo) kaj Suso Moinhos (Galegio, Hispanio).

Rafael Zerbetto estas specialisto pri literaturo; pro tio aparte plaĉas al li studi Esperantan literaturon. Li intencas verki doktoriĝan tezon pri Esperanto kaj estonte instrui en universitato pri interlingvistiko kaj Esperanta literaturo, “temoj malofte diskutataj en universitatoj de mia lando”, konfesas Rafael. Dum siaj studoj en Poznano li ĝoje malkovris, ke la Esperanta literaturo estas multe pli valora kaj bunta ol li antaŭe supozis: “Mi konatiĝis kun multaj verkoj kaj aŭtoroj, kiujn mi antaŭe ne konis, kaj danke al tio mi aktuale estas multe pli konscia pri tio, kio estas esplorinda kadre de Esperanta literaturo, kiel mi povas tion fari, kiuj materialoj disponeblas kiel deirpunkto”. Krome, li perfektigis sian regon pri la lingvo kaj sciojn pri la Esperanta kulturo kaj lingvistiko, afero tre utila por argumenti favore al Esperanto: “Tiusence la studprogramo en Poznano estas la pinta trejnado, kiu ekzistas en Esperantujo aktuale”, diras Rafael. Al nia demando, kion li volus diri al donacintoj kaj esperantistoj ĝenerale, li diris, ke li volas certigi, ke la programo estas inda je investo, ĉar ĝi estas tre utila por kapabligi homojn kaj por la Esperanta movado, kaj por instrui

kaj esplori pri Esperanto en universitata nivelo: “La ekzisto de tiu studprogramo pravas, ke Esperanto funkcias kaj estas uzebla ankaŭ en universitata sfero”.

Karina Oliveira, kiu magistriĝis pri lingvistiko en la Universitato de San-Paŭlo (USP), nomas la interlingvistikajn studojn en Poznano “unikaĵo en la mondo”, ĉar ĝi ja estas postdiploma kurso gvidata tute en Esperanto. La plej plezuriga kaj riĉiga lernobjekto por ŝi estis la studoj pri interlingvistiko (ŝi studis ĝeneralan lingvistikon, sed ne lingvistikon rilate al planlingvoj) kaj ŝi ŝategas studi lingvistikon uzante Esperanton kiel perilon por la lecionoj kaj debatoj. La studoj en Poznano estis ankaŭ la kialo de ŝiaj unuaj internaciaj vojaĝoj: “sperti vivantan Esperanton kaj vojaĝi al aliaj landoj estas mirinda sperto”, diras Karina. Ŝi estas ege dankema al ĉiuj, kiuj helpas realigi tiun grandan studprojekton: “Kiel 24-jara junulino, mi estas en la komenco de mia profesia vivo, kaj mi ne povus memstare pagi por la vojaĝoj, kiuj estas tre multekostaj el Brazilo ĝis Pollando. Tamen, Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) subtenas miajn vojaĝkostojn per donacoj de esperantistoj por tiu celo. Kaj ankaŭ la subteno de ESF rilate al la studkotizoj estas afero, kiu montras al mi la profesiecon de nia komunumo”. La partopreno en la studoj donas al ŝi bonegajn argumentojn kaj veran bazon por pravigi la studon pri Esperanto al la universitata departemento, al kiu ŝi estas ligita: “La plejmulto de la lingvistoj en mia universitato kutime pensas, ke Esperanto estas stultaĵo, sed pli kaj pli mi sukcesas montri, ke Esperanto estas serioza afero”. Ŝi aldonas, ke la kurso samtempe riĉigas la historion de Esperanto, ĉar oni skribas laboraĵojn, filmas prelegojn, kreas sciencon konon pri Esperanto, kaj samtempe ĝi estas fortega argumento por montri al la scienca “mondo”, ke Esperanto vivas kaj estas ege interesa temo por lingvistikaj studoj. Al la donacantoj Karina ŝatus aparte danki, ĉar ŝia partopreno en la kurso absolute ne eblus sen tia monhelpo. La donacoj ja valoras la penon, diras Karina, “ĉar tiu kurso estas gravega por la Esperanta movado kaj la tuta historio de Esperanto mem”.

Dum siaj studoj Suso Moinhos aparte ŝatis la eblon profunde esplori pri diversaj aspektoj de la gramatiko de Esperanto, de ĝiaj kulturo kaj literaturo, sub la gvido de universitataj profesoroj:

“Studi Esperanton universitatnivele, laŭ studprogramo komparebla kun filologiaj studoj de etnolingvo, delonge estis mia revo”, li diras. La studoj postulas multan tempon kaj dediĉon, kaj tio kondiĉas lian tutan ĉiutagan vivon: “En la unua jaro mi devis multon lerni: ne nur la studobjektajn materialojn, sed ankaŭ esplormetodojn kaj teknikojn. Mi devis repreni sur miajn ŝultrojn la kutimon studi kiel en la unuaj universitataj jaroj kaj porti ĝin al novaj kampoj”. Suso aparte aprezas, ke kaj la instruistoj kaj la gestudentoj venas el diversaj landoj kaj kontinentoj, el malsamaj profesiaj kaj studaj sferoj, ĉar tio povas nur riĉigi la vidpunktojn, la interŝanĝojn de opinioj, kaj igi la klason vera ekzemplo de diverseco kaj interkultura etoso. Alia forta punkto favore

al la programo estas la internacia agnosko de la studoj kaj la fakto, ke ili “valoras” 120 kreditojn ECTS*: “Kiam mi komparis tion kun la galegaj universitatoj, mi surpriziĝis: iliaj filologiaj magistriĝoj estas dusemestraj kaj valoras nur 60 ECTS.” Dum siaj studoj Suso lernis unu plian gravan aferon: la kortuŝan solidarecon kaj helpon de nia komunumo: “Al la donacantoj mi povas nur danki. Ili apogas nin decide, fidoplene, tra ESF kaj Edukado.net. Mi klopodas respondi al tiu iniciato per miaj klopodoj en studado. La tago, kiam mi eksciis, ke ESF subvencios nin, mia revo ekrealiĝis. La programo “AMU Poznanon” estas laŭdinda, grandstrebforma de kunefiko”. Se vi volas kontribui al la ekzisto de fakuloj pri Esperanto, pensu pri la programo “AMU Poznanon”,

rekomendas Suso: “Se vi volas trafe uzi monrimedojn, ajnakvante, por antaŭenpuŝi la internaciskalan valorigon de nia lingvo, konsideru la eblon subteni ĉi tiun noblan ideon. Kaj se vi hezitas, provu rakonti pri la postdiploma kurso al neesperantistoj — vi miros pro iliaj respektoplenaj reagoj”.

Kiel donaci al “AMU Poznanon”: rete per esperantic.org/eo/amu aŭ per UEA-konto al ESF: esfo-p (skribu pri la ĝiro al admin@esperantic.org, kaj indiku la celon de la donaco “AMU Poznanon”). La liston de donacintoj legu ĉe esperantic.org/eo/poznano; pli pri la programo ĉe amu.edu.pl/~interl.

* ECTS (European Credit Transfer and Accumulation System) estas internacie agnoskita eŭropa poent-sistemo de universitataj studoj (ĝi funkcias tra Eŭropa Unio kaj ankaŭ pluraj ne-eŭrop-uniaj landoj).

TEJO | Gazetara Komunikado

Rezultoj de la 2-a Muzika Konkurso de la revuo Kontakto

Rogener Pavinski

Martin & La Talpoj kaj La Perdita Generacio estas la venkintoj en la kategorio “Kanto de la Jaro” de la 2-a Muzika Konkurso de *Kontakto*. La *Princino*, de Martin & La Talpoj ricevis la 1-an lokon kaj *La 100-a Fojo* de La Perdita Generacio ricevis la 2-an lokon en la voĉdonado de la ĵurio.

La venkinto en la kategorio “Premio de la Publika” estas la kanto *Tiu Brakumo Unika* de Lucio Avitabile kaj Roberto Pigro, kiu ankaŭ ricevis la premion “Nova Talento”. Estis enkalkulitaj entute 196 voĉdonoj por la “Premio de la Publika”. Partoprenis 14 konkursaĵoj el diversaj stiloj kaj el diversaj landoj, kiuj estis aŭskultitaj 7 896 fojojn.

Kelkaj konkursantoj partoprenis la duan fojon per novaj kantoj (La Perdita Generacio, kiu venkis pasintjare en “Kanto

de la Jaro” kaj “Premio de la publika”, Sepa kaj Asorti, Roberto Pigro kaj SoNori) kaj aliaj konataj muzikistoj partoprenis la unuan fojon (Flávio Fonseca, Ĵomart kaj Nataŝa kaj Martin Wiese). Ankaŭ novaj artistoj kaj pli amatoraj muzikistoj volas konigi al la esperantistaro sian arton, kiel ekzemple Maragan’, Sonori kaj Tiu Ne Gravas.

La konkurso ĉi-jare proponis premiojn por tri kategorioj: Kanto de la Jaro, Premio de la publika kaj Nova Talento. La unua loko por la Kanto de la Jaro ricevos 200 EUR, la dua loko 100 EUR, la gajninto de la Premio de la Publika 100 EUR kaj Nova Talento premiojn unu konkursaĵon per 100 EUR. Ĉiuj premiitoj devas ricevi diplomon/ateston.

La ĵurio en 2015 konsistis el Barbara Pietrzak – Pollando (radio-ĵurnalistino,

estrarano de UEA pri kulturo), Stano Marček – Slovakio (instruisto, eldonisto, membro de Akademio de Esperanto), Kim J. Henriksen – Danio (muzikisto), Szilvási László – Hungario (entreprenisto, ĵurnalistino), Juliana Evandro – Brazilo (estrarano de TEJO pri kulturo).

La Muzika Konkurso de *Kontakto* estas organizita de la revuo Kontakto kaj de la kultura komisiono de TEJO, kun financa apogo de UEA kaj disvastiga helpo de EUROKKA. Ĝi realiĝis unuafoje en 2014 kaj naskiĝis kun la celo plenumi la truon, kiun lasis la forlaso de la branĉo “Muziko” de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2011.

Listo de la konkursantoj: <http://kontakto.tejo.org/2015/07/vocdonu-por-la-2-muzika-konkurso-de.html>

Joaquim Calado (1926-2015) forpasis la 22-an de septembro en Roterdamo, kie li, laŭdevene portugalo, vivis ekde la mezo de la 50-aj jaroj, edziĝinte al e-istino. Li tuj ekaktivis en la klubo Merkurio kaj estis ĝia prezidanto 1964-1976 kaj 1982-1994. Li estis ankaŭ estrarano de Nederlanda E-Asocio. En UEA li membriĝis en 1950. Teknika desegnisto, li estis fakdelegito pri tekniko ekde 1957. De 1986 ĝis 2002 li estis ĉefdelegito kaj ĝis 1999 ankaŭ kotizperanto de UEA. En LKK de la 73-a UK en Roterdamo (1988) li estis kongresejestro. Li regule membris en Societo Zamenhof. Tre valora estis lia helpo dum pli ol 40 jaroj ĉe riparoj kaj cetera prizorgado de la domo de UEA ekde la instaliĝo de la Centra Oficejo en Roterdamo fine de 1955.

Huĝimoto Nacuko (1968-2015), dumviva membro de UEA, mortis la 27-an de septembro en Kameoka (Japanio). Vegetara kuiristino, ŝi estis fakdelegito pri Oomoto kaj vegetarismo.



Hansjörg Kindler

Hansjörg Kindler (1933-2015), konata kiel Trixini, la "magiisto kun la blua ŝtono", forpasis la 22-an de aŭgusto en Kempten (Germanio). Li interesiĝis pri magio kaj pupludado jam kiel junulo kaj vizitis kursojn pri ili. Kiel Trixini li turneis en pli ol 50 landoj, ofte kunlaborante kun e-istoj. Per siaj magiaĵoj li plezurigis partoprenantojn de multaj UK-oj k.a. E-renkontiĝoj. Studinte teologion li estis 17 jarojn romkatolika pastro, laste por germanlingvanoj ĉe la sidejo de la Eŭropa Komunumo en Luksemburgo de 1973 ĝis 1979, en kiu jaro li organizis IKUE-kongreson en tiu urbo. Ekde 1975 li aktivis

en la E-movado, i.a. kiel vicprezidanto de Luksemburga E-Asocio kaj estrarano de Eŭropa Klubo. Li estis komitatano C de UEA 1980-1983 kaj fakdelegito pri magia arto, pupteatro kaj pratolikismo ekde 2003.



Árpád Máthé

Árpád Máthé (1936-2015) mortis la 14-an de septembro en Budapeŝto. Li doktoriĝis pri kemio kaj poste instruis ĝin en la Universitato ELTE en Budapeŝto. Li instruis ankaŭ en la Esperanto-fako de ELTE kaj trifoje prelegis en la Internacia Kongresa Universitato (Roterdamo, 1988; Brajtono, 1989; Vieno 1992). Li membris en la Komitato de UEA kiel komitatano A por Hungario 1989-1992 kaj kiel komitatano C 1992-1995. Fakdelegito pri kemio kaj E-periodaĵoj li estis ekde 1975. En 1987 li starigis kun Rafael Hernández kaj Ana Molera la esplorgrupon Rondo Takács, kiu eldonis la verkon *Inventaro de planlingvistikaj periodaĵoj* (1992) kaj la bibliografian organon *Periodaĵoj* (1993-1994). Ĝia ĉefverko estas la 1175-paĝa *Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto* (2010) kun pli ol 14 000 bibliografiaj datenoj.



Nicholas Nevan

Nicholas (Mikuláš) Nevan (1945-2015) mortis la 21-an de aŭgusto en Florido

(Usono). Ĉeĥdevena, li iĝis nederlandano en 1976 kaj usonano en 1995. Li lernis E-on kiel gimnaziano en Prago kaj baldaŭ ekaktivis en la movado, gvidante kursojn kaj organizante plurajn landajn kaj internaciajn E-aranĝojn. Li gvidis la Junularan Seccion de Ĉeĥoslovaka E-Komitato 1965-1969 kaj estis komitatano de TEJO 1967-1969. Kiel profesia sekretario de Ĉeĥoslovaka E-Komitato li organizis la fondon kongreson de Ĉeĥa E-Asocio en 1969. Samjare li fariĝis Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, kiun oficon li plenumis ĝis 1973. Enmigrinte al Usono en 1978 li hejmiĝis en Portlando (Oregono). En 2005 li retiriĝis al Penango (Malajzio), kie li servis kiel delegito kaj fakdelegito pri monda turismo. Lia vojaĝemo kondukis lin al pli ol 80 landoj sur 4 kontinentoj. Membro de UEA ekde 1963, li e-istigis ankaŭ plurajn el siaj familianoj.



Elena Ševčenko

Elena Ševčenko (1962-2015), la ĝenerala direktoro de la eldonejo Impeto, mortis en Moskvo la 5-an de septembro. Diplomiĝinte kiel ĵurnalisto en la Moskva Ŝtata Universitato en 1986 ŝi kaj la edzo Aleksandr profesie eklaboris pri esperantigo kaj eldonado ĉe gravaj eldonejoj, kiel APN kaj Progreso. Ŝi estis estrarano de Sovetrespublikara E-ista Unio kaj de Rusia E-ista Unio, kunorganizis landajn E-aranĝojn kaj instruis ĉeeste kaj koresponde centojn da gelernantoj. Ŝi fondis kaj longe gvidis la Moskvan Centran E-Klubon. En 1990 ŝi iniciatis la revuon *Moskva Gazeto* kaj redaktis ĝin ĝis 1995. En 1992 ŝi kaj la edzo fondis la firmaon Impeto, kiu eldonis multajn valorajn librojn, i.a. verkojn de novaj E-aŭtoroj kaj tradukojn el rusaj verkistoj, kaj E-lernilojn.



Aliĝu al la komunumo Laste Aperis en Fejsbuko, kie kolektiĝas legantoj por komento de libroj, babilado pri literaturo, aŭtoroj, eldonejoj, tradukoj, libro-merkato kaj koncernaj temoj. Vi povos ankaŭ afiŝi mikrorecenzojn kaj, se ili estas talente verkitaj, vi estos invitita verki recenzon por la revuo *Esperanto*.

Aline. C.F. Ramuz. En Esperanton trad. R. de Saussure. Edegem: MĀS, 2015 (2a eld). 128p. 21cm. ISBN 9782369600282. La herooj de ĉi tiu ĉarma rakonto estas homoj de la kamparo, kies simpla lingvaĵo spegulas la animstaton de la personoj. € 10,80

Belarta rikolto 2015. Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. Div. aŭtoroj. Red. teamo. Nov-Jorko: Mondial, 2015. 85p. 22cm. ISBN 9781595693082. Poezio, prozo, teatro, eseo. € 9,00

Dek bildoj de bovpaŝtado, La. El la ĉina Z. Šibajama. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2015. 53p. 21cm. Kun la originalo ĉina kaj japana traduko. ISBN 9784930785626. Libro de Zen-budhismo verkita en la 12a j.c. € 3,00

Ekzercoj de Zamenhof. Red. Y. Mine. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2015. 38p. 21cm. ISBN 9784930785602. 31 ekzercoj. € 2,10

El la korkelo. Kun aldonaĵo de Biblio – Ijobo. Johano Besada. Edegem: MĀS, 2015. 59p. 22cm. ISBN 9782369600220. Iom pli ol 100 sentencoj, plejparte kun kristana fono. € 7,20

Esperanto por lernejaj klasoj. Paroliga metodo kun ekzercaro 1. Josias Barboza. Braziljo: Unio planeda / Brazila E-Ligo, 2014 (2a eld). 160p. 28cm. Kun kd. ISBN 9788588913127. Kolorilustrita kurso 25-leciona kun abundo da ekzercoj. Ĉi tiu volumo celas la lernantojn. € 18,00

Esperanto por lernejaj klasoj. Paroliga metodo kun ekzercaro 1. Gvidlibro por instruistoj. Josias Barboza. Braziljo: Unio planeda / Brazila E-Ligo, 2014 (2a eld). 174p. 28cm. Kun kd. ISBN 9788588913134. Kolorilustrita kurso 25-leciona kun abundo da ekzercoj. Ĉi tiu volumo celas la instruistojn. € 18,00

Huit ans autour du monde. Maryvonne et Bruno Robineau. Nantes: Opéra, 2015. 262p. 24cm. Ilus. ISBN 9782353700028. Franclingva originalo de *Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo*. € 20,10

Interna milito en Francujo (1871), La

(La Pariza Komunumo). Karlo Markso. Enkonduko de Frederiko Engelso. El la germana trad. V. Lutermano. Edegem: MĀS, 2015 (2a eld). 116p. 22cm. Bind. ISBN 9782369600176. Grava kaj konata teksto pri grava kaj konata evento. € 12,00

Konsilo de ateisto: kreu je Dio. István Sigmond. El la hungara trad. div. Cluj-Napoca: Exit, 2015. 191p. 20cm. ISBN 9789737803207. La aŭtoron okupas la groteskaj trajtoj de la mondo kaj homa naturo, la malforteco, fragileco kaj bestia malico de la homa estaĵo. € 16,50

Lingvomania. Proverbs and idioms from 28 languages in Europe. lingvo.info, 2015. 139p. 15cm. ISBN 9788089366309. Kolorilus. Ĉiu proverbo en la origina lingvo kaj en la angla, eventuale kun klarigo de la senco. € 6,60

Lingvomanio. Proverboj kaj idiomoj de 28 lingvoj en Eŭropo. lingvo.info, 2015. 139p. 15cm. ISBN 9788089366392. Kolorilus. Ĉiu proverbo en la origina lingvo kaj en Esperanto, eventuale kun klarigo de la senco. € 6,60

Malfruaj verketoj. Frederiko Engelso. El la germana trad. V. Lutermano. Edegem: MĀS, 2015. 94p. 22cm. ISBN 9782369600176. Kelkaj tekstoj, malpli konataj, el la lastaj vivjaroj de Engels. € 7,20

Metamorfozoj. Věra Nosková. El la ĉeĥa trad. J. Werner, V. Muchnová. Brno: MSD, 2015. 167p. 21cm. ISBN 9788073922450. La romano okupiĝas pri la periodo antaŭ kaj post la historiaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo en 1989. € 9,00

Obstino, La. Nakazima Atusi. El la japana trad. Miyamoto M. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2015 (2a eld). 95p. 21cm. ISBN 9784947691323. Tri noveloj de reprezentanto de la japana moderna literaturo. € 6,00

Oftecvortaro de Esperanto / Frequency Dictionary Esperanto. Red. Uwe Quasthoff, Sabine Fiedler, Erla Hallsteinsdóttir. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag, 2014. 115p. 22cm. Kun kd. ISBN 9783865838803. Science kompilita vortlisto, kun klarigoj en la angla. € 20,70

Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo. Maryvonne kaj Bruno Robineau. El la franca trad. div. Nantes: Opéra, 2015. 243+16p. 24cm. Koloraj fotoj. ISBN 9782353702091. Spertoj el ok jaroj da migrado tra la mondo, plejparte dank' al Esperanto. € 22,20

Perversaj rilatoj. Victor Sadler. Nov-Jorko: Mondial, 2015. 65p. 21cm. ISBN 9781595693068. Post preskaŭ duona jarcento, la aŭtoro revenas kun kolekto de versoj arigitaj el diversaj vivsezonoj. € 9,90

Poezio internacia. Poésie en espéranto avec traduction en français. Div. aŭtoroj. s.l.: Akademio Literatura de Esperanto, 2015 (2a eld). 125p. 21cm. Dulingva (E, franca). ISBN 9788089366422. Kvardeko da poemoj de 19 aŭtoroj, en la originalo kaj kun paralela traduko en la francan. € 7,50

Rakontoj antaŭ longa tempo. Trad. T. Simatani. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2015. 112p. 21cm. Dulingva (japana, E). ISBN 9784930785619. 32 rakontoj de anonimaj aŭtoroj, verkitaj en la periodo 1120-1150. € 6,00

Roumanie vagabonde. En famille sur les sentiers des Carpates. Maryvonne Robineau. Fotoj de Bruno Robineau. Nantes: Opéra, 2007. 221p. 24cm. Francilingva. "Kolorilus." ISBN 9782353700240. Franca familio vojaĝis dum pluraj monatoj en la norda Rumanio, uzante kiel transportrimedon azenojn kaj jen kaj jen kiel komunikilon Esperanton. € 20,10

Templo de l' suno, La. Hergé. Trad. el la franca. Paris: Casterman, 2012. 62p. 31cm. Bind. ISBN 9782203060678. Tinĉjo kaj lia hundo Milu' spertas novajn aventurojn en Sud-Ameriko. € 12,60


Tra la lando de kanguruoj. Tibor Sekelj. El la serba trad. kolekto. Āurdevac: Dokumenta E-Centro, 2015. 83p. 21cm. Bind. ISBN 97895358441821. Raporto pri vojaĝo kiun la aŭtoro faris en Aŭstralio kaj Nov-Zelando en 1970-71. € 12,00

Tuŝoj je animo / Dotyky duše. Jozef Leikert. El la slovakaj trad. A. Iváková. Bratislava, 2015. 133p. 20cm. Bind. Dulingva: E, slovakaj. ISBN 9788085474664. Poemoj kiuj jen penetras en la animon, jen estas eksterordinare misteraj. € 13,50

LA SUPRAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 5,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

KLASIKA VOJAĜLIBRO

Antaŭ 700 jaroj
Marko Polo vojaĝadis
vaste de Zanzibaro ĝis
Ĉinio, landoj plenaj
de mirindaĵoj por
tiutempa eŭropano.
Liaj spertoj restis
influa fonto de
informoj kaj inspiro
tra jarcentoj. Per sia
verko Marko Polo
kreis ponton inter
du ĉefaj kultursferoj
de la tiama mondo.



Ĝia Esperanto-versio, en verva traduko kaj
klara prizorgo de Daniel Moirand, trovis
naturan lokon en la serio **Oriento-Okcidento**.

LA LIBRO DE LA MIRINDAĴOJ AŬ LA PRISKRIBO DE LA MONDO.
Marko Polo (1225-1324). Esperantigis Daniel Moirand. Rotterdam:
UEA, 2001. 445p. 21cm. Ilus. Serio "Oriento-Okcidento", n-ro 34.
Prezo: €15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Vizitu vian propran domon ĉe
Nieuwe Binnenweg 176 en Rotterdamo dum

MALFERMA TAGO

sabaton la 28-an de novembro 2015 (10h00 - 17h00)



Prelegoj de
Osmo Buller
Povilas Jegorovas
Humphrey Tonkin

- ★ Filmoj
- ★ En la libroservo ĉio kun sesona rabato
- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpagaj

Bonvenon!

PRI HOMOJ KAJ VERKOJ



Dek unu
originalaj
eseoj de naŭ
aŭtoroj pri la
Esperanto-
literaturo,
premiitaj en
la Belartaj
Konkursoj
de UEA.

PRI HOMOJ KAJ VERKOJ. Eseo pri la Esperanto-kulturo
Red. Michela Lipari kaj Humphrey Tonkin. Rotterdam: UEA, 2012.
143p. 24cm. €9,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

INTERLINGVO INTER LINGVOJ



Dek ses
originalaj
eseoj de
dek du
aŭtoroj
pri lingvo
kaj lingvaj
demandoj,
premiitaj en
la Belartaj
Konkursoj
de UEA.

INTERLINGVO INTER LINGVOJ. Prilingvaj eseoj.
Red. Michela Lipari kaj Humphrey Tonkin. Rotterdam: UEA, 2015.
271p. 24cm. €15,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.